

4^a JARO.

OCEANO.

N^{ro} 2-3

TRA LA MONDO.

· TIVTMONDA · ILVSTRATA · REVUO · ESPERANTISTA ·

AUG. - SEPT.

1908.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

ĈIULANDA LITERATURO: Malbona Rido, de V. Ŝulgin (RUSUJO), Kredu al vi, de Lev. Tolstoj, tradukita de Mihaelo Buvin (RUSUJO).

ARTOJ: Liberaeraj Teatroj, de Johanino Flourens (FRANCUJO).

TEATRAĴO: Edziĝa propono, de A. Ĉeĥov kaj R. Frenkel (RUSUJO).

DIVERSAJ SCIENCŬOJ: Oceanaj esploradoj, Televidado kaj Telefotografio, de P-ro Marcel Finof (FRANCUJO).

MILITISTARO KAJ MARISTARO: El la vivado de holanda hinduja oficiro, de K-no A. den Hengst (HOLANDUJO).

FELIETONO: Marie d'Evrav, originala novelo, de Fino C. Oxenford, E. V. K. (ANGLUJO).

POR GEKNABOJ: L'organizo de l' Onkloj, de Viktoro Rakesy kaj Rudo Rajesy (HUNGARUJO).

PRI ESPERANTO: La Kvara, de P-ro Bord,

ARTISTA KAJ LITERATURA VIVADO: Lev. Tolstoj, de Fino Ŝarapov (RUSUJO).



Abono. Jara: 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona: 4.50 fr (1,80 Sm.).

La abonoj komencas en Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro.

Adreso: « Tra la mondo » Meudon (S, & O.) France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Oni skribu legeble, sur respond-poŝtkarto; aŭ oni aldonu respondkuponon al la leteroj.

Internaciaj RESPOND-KUPONOJ estas akceptataj kiel 25 cent (10 sd).

Oni rememorigu ĉiam pri sia adreso.

Adresŝanĝoj estas farataj nur laŭ peto akompanata de 50 centimoj (20 Stl.)

ATTENTU, Sinjorino

ekdikigas, kaj dikiĝi estas maljuniĝi. Prenu ĉiutage du drageojn da **THYROIDINE BOUTY**, ĝi via talio restos aŭ reikiĝos svelta.

La flakono da 50 drageoj estas sendata aŭfranke la: **Laboratoire, 1, Rue de Châteaudun, Paris**, kontraŭ poŝtmandato de **10 fr.** Kuracado ndangera kaj nepre efika.

Oni zorgu precizi: **THYROIDINE BOUTY.**

NOVA ELDONO!

FRANÇOIS COPPEE

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE
AUGUSTE MODXTROSIER



PREZO: 75 CENTIMOJ

PARIS
ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO
21-31, PASSAGE CHOISEUL, 21-31
M. DECELY

Ĉarma verketo de l' fama franca akademi-ano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».
Kaj ĉiuj Esperantaj Librejoj.

VIVO DE JESUO

de **ERNEST RENAN**

laŭ la 78^a milo franca tradukis
EMILIO GASSE

Indebla ĉe ĉiuj librovendistoj, ĉe Emilo Gasse, r. Ernest Renan, Havro, Francujo, kaj ĉe ĉiuj korespondantoj:

British Esperantist, Germana Esperantisto, slanda Esperantisto, Esperantisten, kaj S^{ro} Carl Jost, Fröhlichstr., 40, Zürich (Svisujo).

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondadoj, manuskriptoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn aŭ prokrastojn.

Urgaj sciigoj: **REKLAMOJ, ANONCOJ**, k. a. devas alveni antaŭ la 10^a de ĉiu monato por la tuj elironta Numero.

ONI ABONAS ĉe nia administracio (Vidu la 1^{an} paĝon) aŭ ĉe la esperantistaj gazetoj kaj abonejoj. Oni aldonu ĉiam la abonpaĝon.

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

Vera

Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France).

SENPAGAN TARIFON

Premio al niaj gelegantoj.

Tre rekomendinda estas la

POSHORLOGO "L'ESPERO"

favore disvastiĝinta Tra la Mondo, kiun ni liveras je favoraj kondiĉoj al niaj gelegantoj:

Por **SINJOROJ**: 30 fr. = 12 Sm.
Por **SINJORINOJ**: { Ora, 90 fr. = 36 Sm.;
Arĝenta, 45 fr. = 18 Sm.



Librairie de l'Esperanto

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn.
NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.
NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.
NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto 15, Rue Montmartre Paris.
(Internacia esperantista librejo)

LA INTERNACIA TRINKAĴO VISKIO ESPERANTO


Registered Trade Mark Marque Déposée
N° 270,042 N° 13,195
Registered label N° 272,434

LA OFICIALA VISKIO DE LA TRIA KONGRESO

Buchanan, Scott & C^o

Garthland Street

GLASGOW (Skotlando).



PROVPREZENTADO (RIPETO) DE «HELENO».

Liberaeraj Teatroj.

Aŭgusto baldaŭ alvenos kaj kun ĝi la artaj manifestacioj; tial, Beziers'o, Oranĝo, Toulouse, Carcassonne kaj tiom da aliaj preparas siajn prezentadojn. Tiom da aliaj, mi diris, kaj tute prave, kiel pruvas la jena opinio de Robert de Flers.

«En kiu ajn banurbo vi pasigos vian ripoztempon, vi ne evitos la neeviteblan, enuigan liberaeran teatron. Tiu malbono, kiu unue ŝajnis lokalizita en la urboj de l' sudo, disvastiĝas kun timiga rapideco. Post Beziers'o, kie S^{ro} de Beauxhotes kreis tiun timindan modon, Oranĝo, Nîmes, Pézenas, Carcassonne, kaj eĉ urboj de l' departementoj Eure kaj Seine-et-Oise, havas sian teatron de la Naturo. «Teatro de la Naturo», jen la plej ridinda paradokso esprimita, depost kiam ekzistas homoj, kaj kiam ili diras malspritaĵojn.

«Baldaŭ ĉiuj fontoj diros: «Beletan voĉon mi havas; varbigu min de «l'Opéra Comique» (Komika Opero), ĉiuj kunikloj oferdonos siajn piedojn por vin pudrosmiri, ĉiuj framboj sin proponos por anstataŭi la ruĝilon por lipoj. Ĉar ĝi kredos, ke la merlo mokfajfis pro ĝia kanto, la najtingalo malpaĉiĝos kun ĝi. Ĉiuj kokoj starigos sur siaj ergotoj por vidi, ĉu S^{ro} Edmond Rostand proponas al ili milfrankan bankbileton kaj varbigas ilin por la «Gaité» (Gajeco). La mutaj roloj plu ne kontentigos la karpon, kaj la kukolo postulos, ke oni donu al ĝi la rolon de la amanto. La ardeoj kaj la pingvenoj vetkonuros por ludi «la noblajn patrojn», la silvioj kaj la paruoj akaparos la rolon de l' junaj naivulinoj, la pigoj estos bonegaj servistinoj. La papagoj estos sufloroj; la strigoj, malfermistinoj; la pegoj, maŝinistoj; la vulturoj kaj la garoloj dramkritikistoj. La aktoraro estos tute kompleta, kaj la prezentado baldaŭ komenciĝos.

«Tuj de la morgaŭo ne estos unu sola bosketo, unu sola peceto da ebenaĵo, unu sola valetto florumita de sovaĝaj rozoj, en kiuj ne ekestas la plej akraj disputoj. La suno koleros kontraŭ la luno pro tio, ke ĝi nuligis ĝian efekton, la salikoj ploros en la riveron, kaj el ĉiuj branĉoj siaj riproĉos, ke ĝi per sia senĉesa murmuro volas superi ilian voĉon, la betuloj arĝentitaj kaj tremetantaj en la malpeza aero faros ofendiĝeman mienon, la arbaro koleros kaj laŭtigos sian voĉon, la ebenaĵo turmentetiĝos pro tio, ke oni opinias ĝin iom plata, la torento furiozos, ke oni ĝin riproĉas, ĉar ĝi tro laŭte parolas. La universala, neevitebla malpaco okazos. Kaj tiam ni ne scios, kien iri por trankvile pasigi niajn somerojn. Ni devos fari kiel tiu maljuna reĝisoro, kiu, laŭ recepto de kuraĉistoj, devis iri ĉe altaltecajn lokojn, kaj kiu starigis sur la scenejo de sia teatro la dekoron de *Guillaume Tell*; tie ĉe l'

malsupro de la neĝohavaj montoj de Alpoj, li faris kuracadon, kiu tre sukcese inkluis sur lian farton. Tia estas ja la nekred-ebla kaj mirinda potenco de l' teatra iluzio; pro tio la plej malplaĉa starigo estas la starigo de l' teatroj de la Naturo. Oni devas lasi al la teatro ĝian mensogon, al la naturo ĝian veron, kaj ne peni realigi l' absurdan kaj senfruktan edziĝon de la Realeco kun la Fikcio».

Kvankam tre, tre sprita tiu paradokso ne estas aplaŭdinda, kaj kun multe pli da plezuro mi legis, ke Maurice Magre kontentiĝe konstatas, ke pli kaj pli grandigas la sukcesoj de l' teatroj de la Naturo; ke Marc Varenne ĉiam kun nova ĝojo lasas Parizon ĉe la komenco de Aŭgusto por iri revidi Provencon, tiun modernan Grekujon, kie li ĝuas la prezentadojn en la liberaera teatro de Oranĝo. Li skribis: «La Oranĝa teatro estas ja la naskinto de l' nuntempa movado por la liberaeraj teatraĵoj, kaj mi opinias, ke malgraŭ la tre reala valoro de multo da tiaj manifestacioj, la teatro de Oranĝo sola konservis sian sanktan karakteron. Ĝi ŝajnas esti la templo speciale destinita al la prezentado de ĉefverkoj malnovaj aŭ devenintaj de nova formo de l' drameca arto. Tial mi ne aprobas, ke por ĝia scenejo oni akceptas verkojn de novaj poetoj. Certe, mi konsentas, ke la talento kaj la genio ne estas la propraj de l' pasintaj generacioj; sed, laŭ mia juĝo, la junaj poetoj devas ludigi siajn teatraĵojn en iu ajn liberaera teatro, krom en la Oranĝa. Poste, se ĝi sukcesis, ĝi ricevos en Oranĝo la definitivajn aprobon, tiun, kiu donas la gloron. Tamen mi devas konfesi, ke unu — sed nur unu — el la tri prezentadoj okazintaj la antaŭan jaron en Oranĝo, — nome de Hélène, Endymion, Hypathie d'Athènes, — estis vere inda je tia teatro. «Hélène» de Roger Dumas estas ja vera ĉefverko en kiu sufiĉege malmankas sentoplenaj kaj admirindaj versoj; ne nur ĝi estas aparte interesa, sed ankaŭ ĝi havas altan valoron literaturan». (Mi fiero aldonas — ĉar ĉiam mi fieriĝas pro la glorigoj de miaj amikoj, — ke la talenta Roger Dumas estas la filo de mia eminenta amiko, D^{ro} Dumas, — aŭtoro de la ŝatinda artikolo kontraŭ la korseto, pri kies traduko eble memoras la malnovaj legantinoj de T. l. M. — kiu tre plezure permesis, ke mi esperantigu ĉiun el iliaj verkoj, kiu plaĉas al mi. Nune, S^{ro} Roger Dumas preparas teatraĵojn, kiun li esperas ludigi la venontan vintron en Parizo).

Mi ne volas vin tedi, karaj gelegantoj, daŭrigante la serion da verkistoj, kiuj multe aprobas la teatrojn de la Naturo; mi nur diros, ke mi plene konsentas kun tiu el ili, kiu opinias, ke «per la artaj manifestacioj popolo pruvas, ke ĝi vekiga kaj

Teatro

pli larĝe konscias siajn ekzistadon kaj kapablon.»

Sajnas ja neeble, ke iu povas resti nesentema antaŭ tiaj prezentadoj, kiuj plialtigas la animon kaj havigas realajn kaj fortajn sensaciojn al miloj da ĉeestantoj.

Sufiĉas vidi, kun kia gaja mieno la homoj amasiĝas en niaj arenoj — malgraŭ la blindigaj briloj de nia varmega suno, kiu ŝajnas ilin kovri per fajro — por kompreni, ke popolo avidas miregindan arton, kiu tiel dire ĝin nutras per iluzioj: ĝi ĝojegas, aidante la dolĉan ludon de la eola harparo; ĝi vibradas, kvankam kvazaŭ religie aŭskultante belan ĉefverkon, ĝi feliĉtremas, deliras, aklamante aŭtorojn kaj aktorojn. Ho! certe, ni, loĝantoj de suda Francujo, nedireble ŝatas nian liberan teatron, kaj benas nian Mecenon, S^{ron} de Beauxhostes. Tial, kiom malpacience ni atendas la 30^{an} de Aŭgusto kaj la 1^{an} de Septembro, en kiuj estos ludata «La Unua Glavo» triakta lirica verko de Lucien Népoty, muziko de Henri Rabaud.

S^{ro} Népoty heredis la grandajn parnasajn tradiciojn. Liaj versoj esprimas noblajn sentojn kaj montras, ke la aŭtoro estas delikata klerulo kaj ĉarma poeto.

S^{ro} Rabaud, kiu en Romo atingis la 1^{an} premion, ricevis grandan sukceson per «La Filino de S^{ino} Roland», ludita ĉe la Opéra Comique. La partituro de «La Unua Glavo» estas pura ĉefverko, kaj, laŭ la juĝo de kelkaj majstroj, rimarkindajn paĝojn kompoziciis S^{ro} Rabaud, kies talenton igos evidenta altvaloraj muzikistoj kaj orkestroj da 250 ludistoj.

Ĉe la 1^a akto la dekorado de l' fama pentristo Jambon prezentas primitivan vilaĝon de ibera gento. La plugistoj laboras ĉe l' kampoj; la virinoj preparas la mangadon. S^{ro} Népoty montras feliĉan kaj paceman popolon. Sed alvenas Rhang-Astorg, kiu ekscitas la militemajn pasiojn de siaj samlandanoj. Vergas, kiu personigas la tradicion, la devon, la pacon kaj la laboron, kontraŭstaras la pretendojn de Rhang-Astorg. La lando estas atakata. Vergas konsilas, ke oni forkuru; Rhang-Astorg baras la vojon al siaj samlandanoj kaj kondukas ilin al la batalo. Malia altiras la virinojn al la entrepreno de Rhang-Astorg. La viroj cedas. Sola, Vergas forkuras.

La milito aliĝas la moerojn de tiuj plugistoj. Rhang-Astorg pro sia kuraĝo estas konsiderata kiel diesenca. Li fariĝas la venkinta kaj timata Csaro. Li estas la ĉefo.


Sed Vergas, ĉiam fidela al siaj unuaj amemoj, aperas ĉe l' momento de la festo de la forto, por proklami la ĝojon de l' kampa laboro, la noblajn plezurojn de l' rikoltoj. Ĉe lia voĉo renaskiĝas en la koroj de l' loĝantoj la unuaj ideoj pri fruktodona paco. Ĉiu reprenas la plugilon; sed Rhang-Astorg neoportune alvenas, mokas Vergas-on kaj proklamas, ke ne estas aliaj dioj, krom tiuj, kiujn altrudas la forto, alia rajto, krom la regno de l' plezuro. Vergas estas trafita de sago ĉe l' brusto. Li falas mortige vundita pro tio, ke li defendis la laboron kaj la rajtojn de l' homaro, ke li protestis kontraŭ la malhumilo kaj la pereigaj efikoj de la militado.

Ĉe la 2^a akto estas baleto dancota de 60 baletistinoj de l' teatro de la Scala en Milano kaj de l' ĉefaj parizaj teatroj.


Certege, Bezierso ricevos novan sukceson aplaudatan de miloj da vizitantoj. Se inter ili estus gesamideanoj altiritaj de tia allogo, sincere ĝojus la Beziersaj geesperantistoj.

JOHANINO FLOURENS.

E. V. K. animo.



PREZENTADO DE «BRITANNICUS» ĈE LA TEATRO DE L' KASTELO EN TOULOUSE.



PROVPREZENTADO DE «ENDYMION» ĈE LA TEATRO DE ORANGE.

Edziga Propono

Unuakta Ĥerco, de A. ĈEĤOV. Traduko de ROMANO FRENKEL (Rusuĵo). (1)

IV.

La samaj kaj ĈUBUKOV.

ĈUBUKOV (*enirante*). — Kio okazis? Pri kio vi kri-
as?

NATALJA STEPANOVNA. — Paĉjo, klarigu, mi petas,
al tiu ĉi sinjoro — al kiu apartenas la « Bovaj Her-
bejoj »: ĉu al ni, ĉu al li?

ĈUBUKOV (*al Zomov*). — Karuleto, la Herbejoj est-
as niaj!

ZOMOV. — Kompatu, Stepan Stepaniĉ; de kie ili
estas viaj? Estu, almenaŭ vi, prudenta homo! La
avino de mia onklino fordonis la Herbejojn por kel-
katempa senpaga uzado al la vilaĝanoj de via avo.
La vilaĝanoj uzadis la teron dum kvardek jaroj, kaj
alkutimiĝis al ĝi, kvazaŭ al sia propraĵo, sed, kiam
estis publikigita la decido...

ĈUBUKOV. — Permesu, karega... Vi forgesis, ke
ĝuste la vilaĝanoj ne pagis al via avino, kaj al tio
simila, ĉar la Herbejoj estis tiam pridisputataj kaj
tiel plu... Sed nun ĉiu hundo scias, jen ĝuste, ke ili
estas niaj. Evidente vi ne vidis la planon!

ZOMOV. — Sed mi pruvos al vi, ke ili estas miaj!

ĈUBUKOV. — Vi ne pruvos, mia plejamata!

ZOMOV. — Ne, mi pruvos!

ĈUBUKOV. — Panjonjo, kial vi tiel krias? Per la
krio, jen ĝuste, vi nenion pruvos. La vian mi ne
deziras, sed ankaŭ la mian ellasi mi ne intencas.
Pro kia motivo? Se ĝi venis al tio, mia amindunjo (2),
se vi intencas pridisputadi la herbejojn kaj tiel plu,
mi prefere fordonacos ilin al la vilaĝanoj, ol al vi.
Jen kio!

ZOMOV. — Mi ne komprenas, kian rajton vi havas
donaci malpropran posedaĵon?

ĈUBUKOV. — Permesu al mi ekscii, ĉu mi havas la
rajton, ĉu ne. Jen ĝuste, juna sinjoro, mi ne estas
kutiminta, ke oni parolas kun mi per tia tono kaj
tiel plu. Mi, junsinjoro, estas duoble pli maljuna ol
vi, kaj mi petas, ke vi parolu kun mi sen agitiĝo
kaj tiel plu.

ZOMOV. — Ne, vi simple konsideras min kiel mal-
saĝulon kaj mokas min! Mian teron vi nomas la via,
kaj vi ankoraŭ volas, ke mi estu malvarmsanga,
kaj ke mi parolu kun vi, kiel kun bona homo. Tia-
maniere bonaj najbaroj ne agas, Stepan Stepaniĉ!
Vi estas ne najbaro, sed uzurpulo!

ĈUBUKOV. — Kio! Kion vi diris?

NATALJA STEPANOVNA. — Paĉjo, sendu tuj falĉist-
ojn al la Herbejoj!

ĈUBUKOV (*al Zomov*). — Kion vi diris, sinjoro?

NATALJA STEPANOVNA. — La « Bovaj Herbejoj »
estas niaj, kaj mi ne cedos, ne cedos, ne cedos!

ZOMOV. — Ni tion vidos! Per la juĝistaro mi pruv-
os al vi, ke ili estas miaj.

ĈUBUKOV. — Per la juĝistaro? Vi povas plendi al
la juĝistaro, kaj al tio simila! Vi povas! Mi vin
konas, vi nur, jen ĝuste, atendas okazon por pro-
cesi kaj tiel plu... Intrigaĉema karaktero! La tuta
via familio estis procesaĉema! La tuta!

ZOMOV. — Mi vin petas, ne ofendi mian familion!
En la familio de Zomov'oj, ĉiuj estis honestuloj, kaj
inter ili neniu estis kulpigata pro la malŝparo de la
regna mono, kiel via onklo!

ĈUBUKOV. — Kaj en via Zomov'a familio ĉiuj estis
frenezuloj!

NATALJA STEPANOVNA. — Ĉiuj, ĉiuj, ĉiuj!

ĈUBUKOV. — Via avo estis drinkegulo, kaj via plej
maljuna onklino, jen ĝuste, Nastasja Mihajlovna,
forkuris kun arĥitekturisto, kaj tiel plu.

ZOMOV. — Kaj via patrino havis korpon flanken
kurbigintan (*li ekkaptas sin ĉe la koro*). En la flanko io
ektiras... En la kapo io ekfrapis... Patretoj!... Ak-
von!

ĈUBUKOV. — Kaj via patro estis kartludulo kaj
manĝegulo!

NATALJA STEPANOVNA. — Kaj la onklino — ĉikan-
ulino, kiel oni trovas malofte!

ZOMOV. — Mia maldekstra piedo paraliziĝas... kaj
vi estas intrigulo... Ho, mia koro!... Kaj por neniu
estas sekreto, ke antaŭ la balotoj, vi sub... En miaj
okuloj estas fajreroj... kie estas mia ĉapelo?

NATALJA STEPANOVNA. — Malnoble! Malhoneste!
Abomeninde!

ĈUBUKOV. — Kaj vi mem estas, jen ĝuste, malica,
hipokrita kaj malutilaĉa homo! Jes!

ZOMOV. — Jen ĝi estas, la ĉapelo... Mia koro...
Kien iri? Kie estas la pordo? Ho! Ŝajnas, ke mi
mortas... Mia piedo treniĝas... *Li iras al la pordo*.

ĈUBUKOV (*post li*). — Kaj via piedo plu ne estu en
mia domo!

NATALJA STEPANOVNA. — Plendi al la juĝis'aro! Ni
vidos!

(ZOMOV *foriras balancetiĝante*).

V.

ĈUBUKOV kaj NATALJA STEPANOVNA.

ĈUBUKOV. — Al la diablo! (*Li marŝas kun ekscitiĝo*).

NATALJA STEPANOVNA. — Kia sentaŭgulo! Jen kre-
du post tio al bonaj najbaroj!

ĈUBUKOV. — Abomenindulo! Piza birdtimigilo!

NATALJA STEPANOVNA. — Malbelegulo tiela! Al-
propris al si malpropran teron, kaj ankoraŭ ku-
raĝas insultadi.

ĈUBUKOV. — Kaj tiu koboldo, tiu, jen ĝuste miopa
kokino, ankoraŭ kuraĝas fari proponon, kaj tiel
plu! Ha? Proponon!

NATALJA STEPANOVNA. — Kian proponon?

ĈUBUKOV. — Jes, imagu: li alveturis por fari al vi
edzigan proponon.

NATALJA STEPANOVNA. — Edzigan proponon? Al
mi? Kial vi tion ne diris al mi antaŭe?

ĈUBUKOV. — Pro tio li sin frake ornamis! Kolbas-
eto tiela! Morĥelo!

NATALJA STEPANOVNA. — Al mi? Edziĝproponon?
Ha! (*ŝi falas en apogseĝon kaj ĝemas*). Revenigu
lin! Revenigu lin! Ha! Revenigu!

ĈUBUKOV. — Kiun revenigi?

(1) Sekvo. Vidu la unuan numeron.

(2) Amindunjo = karesanta formo de amindulino; kiel jam estis rimarkite, Ĉubukov nomas kelkfoje virojn per virinaj
karesantaj nomoj.

NATALJA STEPANOVNA. — Pli rapide, pli rapide! Mi svenas! Revenigu lin! (*Histerio*).

ĈUBUKOV. — Kio estas? Kio estas al vi? (*li ek-kaptas sian kapon*). Malfeliĉa homo mi estas! Mi min mortpafos! Mi min pendigos! Mi estas elturmentigita!

NATALJA STEPANOVNA. — Mi mortas! Oni revenigu lin!

ĈUBUKOV. — Pfu! Tuj. Ne ploraĉu! (*li foriras*).

NATALJA STEPANOVNA (*sola, ĝemas*). — Kion ni estas farintaj! Oni lin revenigu! Oni lin revenigu!

ĈUBUKOV (*eniras*). — Tuj li venos kaj tiel plu, la diablo lin prenu! Uf! Parolu mem kun li, kaj mi, jen ĝuste, ne deziras...

NATALJA STEPANOVNA. — Oni lin revenigu!

ĈUBUKOV (*krias*). — Li venas, oni diras al vi! *Ho kia tasko, ho kreinto, patr' esti de filin' plenaĝa!* (1) Mi min mortbuĉos! Nepre mortbuĉos! Oni insultis homon; oni lin malhonorigis, forpelis, — kaj ĉion tion faris vi... vi!

NATALJA STEPANOVNA. — Ne, vi!

ĈUBUKOV. — Kaj post ĉio estas mi la kulpulo, jen ĝuste?! (*ĉe la pordo aperas Zomov*). Nu, parolu mem kun li (*li foriras*).

VI.

NATALJA STEPANOVNA kaj ZOMOV.

ZOMOV (*eniras malfortigita*). — Terura korbato... Mia piedo rigidigis... En mia flanko io tiregas...

NATALJA STEPANOVNA. — Pardonu, ni agis tro kolere, Ivan Vasiljeviĉ... Nun mi ekrememoras: la « Bovaj Herbejoj » estas efektive viaj.

ZOMOV. — Terure batas mia koro... La Herbejoj estas miaj... Ambaŭ okuloj miaj konvulsie saltetas...

NATALJA STEPANOVNA. — Viaj, viaj estas la Herbejoj... Sidiĝu... (*ili sidiĝas*). Ni estis nepravaj...

ZOMOV. — Por mi, nur la principo... Ne la tero estas kara al mi, sed kara estas la principo...

NATALJA STEPANOVNA. — Jes, ĝuste la principo... Ni parolu pli bone pri io alia.

ZOMOV. — Tion pli, ke mi havas pruvojn. La avino de mia onklino fordonis al la vilaĝanoj de la avo de via patro...

NATALJA STEPANOVNA. — Sufiĉe, sufiĉe pri tio... (*al si*). Mi ne scias per kio komenci... (*al li*). Ĉu vi baldaŭ intencas ĉasadi?

ZOMOV. — Je la tetroj, estimata Natalja Stepanovna, mi supozas komenci post la rikolto. Ha, ĉu vi aŭdis? Imagu, kia malfeliĉo atingis min! Mia Divenu, kiun vi koni bonvolas, eklamis.

NATALJA STEPANOVNA. — Kia domaĝo! Pro kio do?

ZOMOV. — Mi ne scias... Versajne, ĝi elartikigis la piedon, aŭ ĝin mordis aliaj hundoj... (*li ekĝemas*). La plej bona el ĉiuj hundoj, jam ne konsiderante la monon! Mi ja pagis por ĝi al Mironov 125 rublojn.

NATALJA STEPANOVNA. — Vi tropagis, Ivan Vasiljeviĉ!

ZOMOV. — Kaj laŭ mi, tio estas tre malkara. La hundo estas mirinda.

NATALJA STEPANOVNA. — Paĉjo donis por sia Ekkaptu 85 rublojn, sed Ekkaptu estas ja multe pli bona, ol via Divenu!

ZOMOV. — Ekkaptu estas pli bona ol Divenu? Kion vi diras (*li ridas*)! Ekkaptu, pli bona, ol Divenu!

NATALJA STEPANOVNA. — Certe, pli bona! Ekkaptu estas, por diri la veron, juna, ĝi ankoraŭ ne maturhundiĝis (2), sed koncerne la korpteniĝon kaj kurfacilecon pli bonan hundon ne havas eĉ Volĉanĉekij.

ZOMOV. — Permesu, Natalja Stepanovna, sed vi forgesas, ke ĝi estas subebrida, kaj subebrida hundo estas ĉiam nekapt pova!

NATALJA STEPANOVNA. — Subebrida? I.a unuan fojon, mi aŭdas!

ZOMOV. — Mi certigas vin, ke la malsupra makzelo estas pli mallonga, ol la supra.

NATALJA STEPANOVNA. — Sed, ĉu vi mezuris?

ZOMOV. — Mi mezuris. Por la lacpelado ĝi certe taŭgas, sed se por « ekposedu » mi dubas...

NATALJA STEPANOVNA. — Unue, nia Ekkaptu estas bonrasa, densahundo, ĝi estas ido de Enjungu kaj Ĉizilino, kaj ĉe via makulkolorulo oni ne povas eldiveni la rason... Plie ĝi estas maljuna kaj malbela, kiel ĉevalaĉo...

ZOMOV. — Maljuna, — sed tamen por ĝi mi ne akceptus eĉ kvin viajn Ekkaptu'ojn... Ĉu estas eble? Divenu estas hundo, kaj via Ekkaptu... eĉ la disputo estas ridinda... Tiajn, kiel via Ekkaptu, ĉe ĉiu hundisto oni povas trovi tion, ke eĉ laĝeton digigu... Kvaronbileto (3) estas la plej alta prezo.

NATALJA STEPANOVNA. — En vi, Ivan Vasiljeviĉ, sidas hodiaŭ ia demono de kontraŭdiro. Jen iaj elpensajoj, ke la Herbejoj estas viaj, jen Divenu estas pli bona, ol Ekkaptu. Mi ne amas, kiam iu homo ne diras tion, kion li pensas. Vi ja bonege scias, ke Ekkaptu estas centfoje pli bona, ol via... tiu malsaĝa Divenu. Por kio do paroli kontraŭe?

ZOMOV. — Mi rimarkas, Natalja Stepanovna, ke vi konsideras min kiel blindulon aŭ naivegulon. Komprenu do, ke via Ekkaptu estas subebrida!

NATALJA STEPANOVNA (*krias*). — Malvero!

ZOMOV. — Kial do vi krias, fraŭlino!

NATALJA STEPANOVNA. — Pro kio vi diras sensencaĵojn? Tio ja estas indigniga! Jam venis la tempo por mortepafi vian Divenu'on, kaj vi komparas ĝin kun Ekkaptu!

ZOMOV. — Pardonu, mi ne povas daŭrigi tiun ĉi disputadon. Mi havas korbatojn.

NATALJA STEPANOVNA. — Mi rimarkis: tiuj ĉasistoj pleje disputas, kiuj malpleje komprenas.

ZOMOV. — Fraŭlino, mi petas, eksilentigiu. Mia koro krevas... (*li krias*) Eksilentigiu.

NATALJA STEPANOVNA. — Mi ne eksilentigos, ĝis kiam vi konsentos, ke Ekkaptu estas centfoje pli bona, ol via Divenu!

ZOMOV. — Centfoje pli malbona! Ĝi krevu, via Ekkaptu! Miaj tempioj... miaj okuloj... mia ŝultro...

NATALJA STEPANOVNA. — Kaj via malsaĝa Divenu ne bezonas krevi, ĉar ĝi jam sen tio estas kvazaŭ mortinta!

ZOMOV (*ploras*). — Eksilentigiu! Mia koro ŝirigas.

NATALJA STEPANOVNA. — Mi ne eksilentigos!

VII.

La samaj kaj ĈUBUKOV.

ĈUBUKOV (*eniras*). — Kio ankoraŭ?

NATALJA STEPANOVNA — Paĉjo, diru sincere, el

(1) Citajo el « Malfeliĉo dank' al Saĝo » de Gribojedov.

(2) La komikeco de la sekvanta sceno konsistas el tio, ke Zomov kaj Nat. St. uzas specialajn teknikajn ĉasesprimojn preskaj nekomprenblajn en la originalo eĉ por la rusoj, se ili ne estas ĉasistoj.

(3) T. e. 25 rubloj (papermona bileto), kvarono da cent rubloj.

pura konscienco: kiu hundo estas pli bona — ĉu nia Ekkaptu aŭ lia Divenu?

ZOMOV. — Stepan Stepanoviĉ, mi petegas vin, diru nur sole tion: ĉu via Ekkaptu estas subebrida aŭ ne? Jes aŭ ne?

ĈUBUKOV. — Kaj eĉ se tiel estus! Jen grava afero! Sed kompanse, en la tuta distrikto ne estas pli bona hundo kaj tiel plu.

ZOMOV. — Sed mia Divenu estas ja pli bona? Laŭ la konscienco!

ĈUBUKOV. — Vi ne ekscitiĝu, karega... Permesu... Via Divenu, jen ĝuste, havas siajn bonajn ecojn... Ĝi estas purerasa, sur fortikaj piedoj, krutfemura kaj al tio simila. Sed tiu hundo, se vi deziras scii, belulo mia, havas du gravaj difektojn: ĝi estas maljuna kaj kun mallonga kalkanpinto.

ZOMOV. — Pardonu, mi havas korbataĉon... Ni ekzameni la faktojn... Bonvolu ekrememori, en la Marinaj Verdaĵoj mia Devenu kuris kun la grafa Dissvingu orelo ĉe orelo, kaj via Ekkaptu poste restis tutan verston.

ĈUBUKOV. — Posterestis, ĉar la grafa hundestro ekbatis ĝin per vipo.

ZOMOV. — Laŭ ĝia merito. Ĉar ĉiuj hundoj kuris post la vulpo, kaj via Ekkaptu komencis ŝafon skuŝiri!

ĈUBUKOV. — Malvero!.. Karulineto, mi estas ekflamema kaj, jen ĝuste, mi petas vin, ni ĉesigu tiun ĉi disputadon. Li ĝin ekbatis, ĉar ĉiu deziris, rigardi malpropran hundon... Jes, jes! Ĉiuj estas en-viemuloj! Kaj vi, sinjoro, ankaŭ ne estas senpeka! Apenaŭ, jen ĝuste, vi rimarkas, ke ies hundo estas pli bona, ol via Divenu, vi tuj komencas tion, ĉi tion... samon... kaj al tio similan... Mi ja ĉion memoras!

ZOMOV. — Mi ankaŭ memoras!

ĈUBUKOV (*incitas*). — « Mi ankaŭ memoras »... Sed kion vi memoras?

ZOMOV. — Korbataĉo... mia piedo paraliziĝas... Mi ne povas...

NATALJA STEPANOVNA (*incitas*). — « Korbataĉo »... Kial vi estas ĉasisto? Pli bone konvenas al vi kuŝi sur la forno (1) kaj blatojn mortepremi, ol vulpojn pelĉasi! « Korbataĉo »...

ĈUBUKOV. — Vere, kial vi estas ĉasisto? Kun viaj, jen ĝuste, korbatoj oni devas resti hejme kaj ne skuigi sur la selo. Estus alia afero, se vi efektive ĉasadus, sed vi ja kunrajdas nur por disputadi kaj malproprajn hundojn malhelpi, kaj tiel plu. Mi estas ekflamema, ni forlasu tiun ĉi temon. Vi tute ne estas, jen ĝuste ĉasisto!

ZOMOV. — Kaj vi, ĉu vi estas ĉasisto? Vi rajdas al la ĉaso nur por vin alĝui al la grafo kaj por intrigadi... La koro!... Vi estas intrigulo!

ĈUBUKOV. — Kio? Mi, intrigulo? (*li krias*) Eksilentiĝu!

ZOMOV. — Intrigulo!

ĈUBUKOV. — Bubaĉo! Hundido!

ZOMOV. — Maljuna rato! Jezuito!

ĈUBUKOV. — Eksilentiĝu, alie mi mortpafos vin per malbonaĉa pafilo, kiel perdrikon! Fajfaĉulo!

ZOMOV. — Ĉiuj scias, ke — ho, mia koro! — via edzino vin batadis... mia piedo... miaj tempioj... fajreroj... Mi-falas, mi falas!...

ĈUBUKOV. Kaj ci estas sub la ŝuplando de cia domistino!

ZOMOV. — Jen, jen, jen... kreas mia koro! Mia ŝultro elŝiriĝas... kie estas mia ŝultro?... Mi mortas. (*li falas en la apogseĝon*). Kuraciston! (*li svenas*).

ĈUBUKOV. — Bubaĉo! Laktinfano! Fajfaĉulo! Mi svenas! (*li trinkas akvon*). Mi svenas!

NATALJA STEPANOVNA. — Kial vi estas ĉasisto? Vi eĉ sidi sur ĉevalo ne povas! (*al la patro*). Paĉjo kio estas kun li? Paĉjo! Rigardu, paĉjo! (*ŝi ekkrietas*). Ivan Vasiljeviĉ! Ho, li mortis!

ĈUBUKOV. — Mi svenas!... Mia spirado haltiĝas!... Aeron!

NATALJA STEPANOVNA. — Li mortis? (*ŝi skuetas Zomov'on je la maniko*). Ivan Vasiljeviĉ! Ivan Vasiljeviĉ! Kion ni estas farintaj! Li mortis! (*ŝi falas en apogseĝon*). Kuraciston! (*Histeria krizo*).

ĈUBUKOV. — Ha!... Kio okazis? Kion vi volas?

NATALJA STEPANOVNA (*ĝemas*). Li mortis!... Mortis!...

ĈUBUKOV. — Kiu mortis? (*ekrigardante al Zomov*). Efektive, li mortis! Patretoj! Akvon! Kuraciston! (*li alportas kaj metas glason da akvo al la buŝo de Zomov*). Trinku... Ne, li ne trinkas! Sekve, li mortis kaj al tio simila... Malfeliĉa homo mi estas. Kial mi ne sendas kuglon en mian frunton? Kial mi ĝis nun ne mortbuĉis min? Kion mi atendas! Donu al mi tranĉilon! Donu al mi pistolon! (*Zomov movetas sin*). Ŝajnas, ke li reviviĝas... Trinku akvon!.. Jen tiel...

ZOMOV. — Fajreroj... Nebulo... Kie mi estas?

ĈUBUKOV. — Edziĝu plej baldaŭ kaj — prenu vin la koboldo! Ŝi konsentas! (*li kunigas la manojn de Zomov kaj de sia filino*). Ŝi konsentas kaj al tio simila. Mi benas vin kaj tiel plu. Nur lasu min kvieti.

ZOMOV. — Ha! kio? (*leviĝante*) kiun?

ĈUBUKOV. — Ŝi konsentas! Nu? interkisu vin... kaj la diablo vin prenu!

NATALJA STEPANOVNA (*Ĝemas*). — Li vivas!... Jes, jes, mi konsentas...

ĈUBUKOV. — Kisu vin reciproke!

ZOMOV. — Ha! kiun? (*Li kaj Natalja Stepanovna kisas sin reciproke*). Tre agrable... Permesu, pri kio l' afero? Ha, jes, mi komprenas... mia koro... fajreroj... Mi estas feliĉa, Natalja Stepanovna... (*Li kisas ŝian manon*). Mia piedo paraliziĝis...

NATALJA STEPANOVNA. — Mi... ankaŭ estas feliĉa...

ĈUBUKOV. — Kvavaŭ mont' estus for de la ŝultroj! — Uf!

NATALJA STEPANOVNA. — Sed... tamen konsentu nun: Divenu estas malpli bona, ol Ekkaptu.

ZOMOV. — Pli bona!

NATALJA STEPANOVNA. — Malpli!

ĈUBUKOV. — Nu, komenciĝas la geedzeca feliĉo! Ĉampanon!

ZOMOV. — Pli bona!

NATALJA STEPANOVNA. — Malpli! Malpli! Malpli!

ĈUBUKOV (*penante superkrii*). Ĉampanon! Ĉampanon!

LA KURTENO FALAS.

El la rusa lingvo tradukis:

ROMANO FRENKEL.

(1) En Rusujo la fornoj en la vilaĝaj domoj estas tiel aranĝitaj, ke la vilaĝanoj povas dormi sur ili dum la vintro. « Kuŝi sur la forno » = Nenion fari pro mallaboremo aŭ pro mallerteco.

El miaj rememoroj. — Malbona rido.

Ni loĝis duope: mi kaj Roberto F*, mia amiko.

La domo, en kiu ni loĝis, staras sur unu el la malproksimaj stratoj de l'urbo, sur la bordo de la rivero. La preskaŭ tuta bordo estas okupata de malaltaj, malpuraj konstruitaĵoj, kiuj servas kiel « fiŝaj kuŝejoj », konstruitaj laŭ du vicoj, tiel ke inter ili formiĝis mallarĝa vojo, kiun oni nomas: « Fiŝa strato ».

Efektive, enirante tiun ĉi straton, ĉiu sentas la kunmiksitan odoron de la freŝa kaj putriĝinta fiŝaro. Tia odoro portas sin ne nur en aeron, sed plenigas ĉian malplenaĵon, ĉian trueton. Mi opinias, ke la lanternoj, kiuj, por ekbruligo, estas malfermitaj dufoje en unu nokto, plenigas je « la fiŝa odoro » tiel forte, ke transportitaj en helan kaj grandan straton, ili estus sufiĉaj por plenigi ĝin je la « fiŝa odoro ». Tiam la delikataj virinoj kaj fraŭlinoj devus kovri siajn ĉarmajn vizaĝetojn, por ne flari malbonan odoron.

Precipe forta estas la odoro, kiam la vendistoj malfermas siajn fiŝajn magazenetojn, kaj la strato estas okupata de la aĉetantoj, malriĉuloj kaj kuirstinoj, gaje babilantaj pri la diversaj temoj, malgraŭ malgrabra aero.

Sed ni ne loĝis en « fiŝaj vendejoj ». « Nia » domo estas granda, plej granda el ĉiuj domoj de la « fiŝa strato ». Kiel akvuja turo, la domo altiĝas super malgrandaj konstruitaĵoj. Ĝi havas kvar etaĝojn. Sur la mezaj etaĝoj troviĝas beletaj kaj helaj ĉambroj, kien la fiŝa odoro ne venas. Sed ni okupis malgrandan ĉambron supre, sur la kvara etaĝo; « sub preskaŭ nuboj mem », tiel ni diris ŝercante. Ni luis ĝin de unu fiŝa vendistino po 6 rubloj ĉiumonate. Kiel bone mi prezentas al mi la figuron de nia mastriĉo, necivilizita, sed bonanima virino, kiu estis kontenta, ke, en ŝia loĝejo, la ĉambron okupas « sinjoroj studentoj ». Klare mi memoras ŝian ŝvelintan vizaĝon, kiun rideto lasis neniam, ŝian larĝan kaj dikan korpon; eĉ mi aŭdas ŝian voĉon laŭtan, sed karesan. Unuvorte mi vidas nian mastriĉon, kiam mi ekpensas pri ŝi.

Ankaŭ tre bone mi memoras filinon, Katerinon, kiu estis ne bela, sed saĝa. Sen helpo instruista

Katerino lernis kaj pretiĝis al la ekzameno je « instruistino ». Tre bone mi memoras, ke, iam sidante en nia ĉambro, ni aŭdis mallaŭtajn sonojn post la muro: Katerino studadis ian sciencan libron. Poste mi eksciis, ke ŝi estas partopreninta en « liberiganta rusa movado ».

Ni loĝis duope: mi kaj Roberto F* mia kolego. Kial la sorto kunigis nin? Nia amikeco estas mirinda, ĉar ni estas tute malsamaj: li estas Livlandano, simila al Kaŭkazano, altkreska, fortika kaj bela, kun regulaj trajtoj, densaj krispaj haroj; lin amas virinoj. Sed mi estas ruso, malfortulo kaj malsanema estulo, unuvorte — mi estas ordinara homo. Mia pala vizaĝo, kun « rusa » nazo, dikaj lipoj kaj brilaj okuloj, kuŝantaj en la orbitaj profunde, ne estas iom originala kaj bela.

Ankaŭ niaj konvinkaĵoj tute diferencas: li estas « materialisto », sed mi — « profunda idealisto ».

Kredeble unu similaĵo kunigis nin: nia malriĉeco. Ni apartenas al tiu parto de la rusa lernanta junularo, kiu estas nomata: « malsata studentaro » kaj tre bone karakterizita de la rusa literaturo.

Ni levis nin de la lito je la 9^a horo matene. Mi vekigis la unua. Ekrigardante surmuran horloĝon (« propran » horloĝon ni ne havis), mi vokis: « Roberto ! »

La kontraŭa lito ekmoviĝis, kaj el sub la kovrilo, harplena kapo montris sin, dormemaj okuloj malfermis sin, homa voĉo respondis: « Ha ! »

Vestinte nin, ni iris en malgrandan ĉambreton sub tegmento mem, por laviĝo.


Post tea trinkado, mi pretiĝis min por iri en la « lernejon », ĉar mi estis unu el la « diligentaj studentoj ». Ĉiafoje mi invitis Roberton: « Ni iru lernejon kune », kaj ĉiafoje Roberto respondis: « Ne... mi alvenos poste. Mi iros... » Neniam li aldonis: kien li iros, ĉar li restis ĉambre. Post lernejoj lecionoj mi vizitis miajn « klientojn ». Tiavorte mi nomas miajn privatajn lernantojn, precipe riĉajn geinfanojn, malbone sukcesantajn en la « fako de la sciencoj », t. e. aritmetiko, historio, ruslingvo, k. t. p., dank' al sia maldiligenteco, kaj bezonantaj mian helpon, por



DAUMIER.

Dum la monato Aŭgusto, ĉe la vilaĝeto Valmondois, oni fiksas marmoran tabulon sur la domon kie mortis Honoré Daumier, por rememorigi, ke tie vivis siajn lastajn jarojn la plej granda karikaturo de la XIX jarcento.

Daumier skribis la tutan kronikon de epoko, kiel Saint-Simon. Li estis — kaj tio estas lia granda merito — portretisto same kiel karikaturo, historiisto samtempe kiam satiristo. Li vivis la malvirton en majstrecaj paĝoj rigardataj emocio, sed ankaŭ ridigas senĝene per la pentro de l' ridindaĵetoj de sia epoko. En la apuda desegnaĵo, li sin mokis pri la krinolino, kiu inspiris tian spritan artikolon al Roksano antaŭ du tagoj.



Pro la okupoj de nia ĉefredaktoro, la Oktobra Numero aperos nur, kun la Novembra, je la fino de Novembro.

kiu mi ricevadis de iliaj gepatroj ĉiumonatan pagon, kiu donis al mi rimedon por « spiri » kaj « rigardadi dian mondon ».

Je la 7^a horo vespere mi revenis hejmen. Malferminte la pordon de nia ĉambro, iafoje mi observis la sekvantan interesan vidaĵon. Roberto kuŝas sur sia lito kaj dormas kiel juna knabeto, kovrinte sian vizaĝon per la vespera gazeto.

Sur la tablo staras la botelo, el kiu la brando estas jam eltrinkita, kuŝas pecetoj da pano kaj aliaj manĝajaj restoj....

... La nokto alvenas. Traleginte la vesperan gazeton laŭte, kaj fininte laborojn pri « sciencaj demandoj », en nokto profunda ni kuŝiĝas sur niajn litojn. Post serioza legado niaj kapoj ne volas trankviliĝi, kaj la dormo ne alvenas por fermi niajn okulojn; ni ekbabilas. Mi ekparolas unua: « Roberto! Vi ne vizitis lernejon hodiaŭ; kie vi vagadis? »

Mia amiko, ĉiam silentema, iĝas babilema, nur kiam la lampo estas estingita, kaj tra la sola fenestro de nia ĉambro eniĝas la radioj de la luno aŭ de l' lanterno, staranta sur la ĉefpreĝeja placo. Tiam, briliginte la kupran teujon, forgesitan de la mastrino sur la tablo, larĝa strio de la nehela lumo kuŝiĝas sur la plankon.

Tiam la nudaj muroj de nia ĉambro kovriĝas de la poezia mallumeto, en kiu flugas la bona Morfeo.

Roberto respondas: « Mi estis okupata de aliaj seriozaj aferoj: mi pretiĝas tralegi tezon en nia societeto. Nun mi povas diri, ke mi ricevis multe da sciigoj, kaj mia raporto estas preskaŭ preta. Baldaŭ mi legos ĝin en nia kunvenejo ».

Mi ridetas, ĉar mi divenas la temon, pri kiu la anoj de tiu ĉi « societeto » amas legi raportojn. Nun mi deziras konvinkiĝi pri la certeco de mia deveno:

« Pri kiu temo vi deziras legadi tezon? » — « Batalado de klasoj! » Eĉ Roberto suprenmoviĝas sur sia lito. Li ekrakontas pri la klasa batalado, kiu estas la fundamento de la nuna kapitalista konstruicio societa: « Nun oni rimarkas la ekzistadon de du ĉefaj klasoj: la kapitalistoj kaj la proletarioj aŭ paŭperoj. Ili bataladas inter ili. La konkurado de la

industriistoj alkondukas al koncentriĝo de la kapitaloj kaj nombra malpligrandiĝo de la kapitalistoj, kontraŭ kiuj kreskanta laboristaro bataladas senpardone. La proletario venkos, kaj alvenos « la regno socialisma ». En Okcidenta Eŭropo klare oni rimarkas la kreskon de l' laborista movado kaj la sukceson socialistan. En Rusujo la laborista partio progresadas ankaŭ, sed « burĝa vilaĝanaro » malhelpas la laboristaron... »

Li parolas multe, kaj, aŭskultante lin, mi pripensas la kontraŭparolon. Kiam li ekfinas, mi ekkomencas respondi al li. Nia disputo ekscitas nin. Senĉese ni diskutas, forgesante, ke la nokto servas por la ripozo.

Nun kun granda plezuro mi rememoras niajn entuziasmajn paroladojn, kiujn ni eldiradis, kuŝante sur la litoj en ĉambro de kvara etaĝo, sur Fiŝa strato. Mi rememoras, ke finfine niaj trankvilaj juĝoj finiĝas per krioj; niaj ĝentilaj riproĉoj iĝas insultoj:

— « Psikopato! » (*)

— « Burĝa ideologo! »

Per tiuj ĉi du paroloj finiĝas nia scienca disputo. Ni turnas niajn vizaĝojn al muroj kaj eksilentas. Sed ni ne povas ekdormi. Post kelkaj minutoj iu ajn diras trankvile: « Ĉu vi dormas? »

— « Ne... » — Aŭskultu: levu vin kaj ekbruligu unu cigaredon... » Baldaŭ ni levigas duope, kaj fumas sidante apud tablo en hejma tolaĵo kaj interparolante pri alia temo.

— « Ĉu vi vidis vian « princinon » hodiaŭ? »


— « Mi vidis... Sed vi? »

— « Jes. Mi vidis ankaŭ. »

Malgraŭ nia malriĉeco kaj la seriozaj okupaĵoj, ĉiu el ni havis sian « virinon de la koro », sian « princinon », kiu ekzistis pli en la reveco kaj imago, ol en la efektiveco.

Ankoraŭ longe en nia ĉambro du fajretoj brulas, jen lumante, jen estingigante: ni fumas ankoraŭ. Ie ajn malsupre la koko ekkantas sian saluton al la mateno, sciigante pri baldaŭa tago.

(*) *Cerbmalsanulo.*



LA SOLENA ĈARO DE L' ANGLA REĜO.

POMPO KAJ SIMPLECO.

Dum la vojaĝo de l' Prezidanto de la franca Respubliko en Norvegujo, reĝo Haakon veturigis sian gaston en simpla omnibuso, por konkudi lin en la ĉirkaŭaĵon de Kristiania.

Tiu simpleco kontrastas amuze kun la pompo oficiala de la angla kortego.



Nur tiam Morfeo ekkompatas nin kaj prenas nin inter siaj brakoj.

* * *

Tio, kion mi deziras rakonti okazis post kelkaj monataj de nia kunloĝado. Malfacila tempo! Perdinte la tutan perlaboron, mi havis nenian kopekon en poŝo. De longe Roberto ricevis nenian « helpon » el sia hejmo. Eĉ ni ne havis monerojn por aĉeti iom da tabako. Kaj kiom da ŝuldoj ni havis! Al la manĝejo kaj la dommastrino ni ŝuldis grandan sumon, kiun ni devas pagi baldaŭ. Sed ni atendis nenian enspezon. Ni sidis en la ĉambro kaj pripensis la eliron el malfacila stato, ni kalkulis; kaj rezultis, ke baldaŭ niaj ŝuldoj kreskos multege kaj granda sumo estos postulata por pagi ilin. Rezultis, ke nur ia feliĉa okazo savos nin.

Ŝajnis, ke la feliĉa okazo prezentigis. Foje Roberto ricevis leteron, kaj, traleginte ĝin ekkriis: « Hura!.. Ni estos riĉaj! » kaj montris al mi la leteron:

Nord-Ameriko. Ĉikago.

KARA FRATO,

Okaze ricevinte vian adreson, mi estas feliĉa korespondadi kun vi. Multaj jaroj forflugis de mia forveturo de nia hejmo, kaj mi ricevadis pri vi neniajn sciigojn. (La kaŭzo de la familia malpaco estas konata de vi, mi opinias). Sed mi forgesadis vin neniam. Nun mi kuraĝas skribi al vi kaj sciigas, ke miaj aferoj pliboniĝis: mi estas feliĉa riĉulo. Okaze eksciinte, ke vi bezonas monon, mi kuraĝas sendi al vi, per proksima kuriero, ian sumon. Estu agrabla al mi kaj volu akcepti, kara frato, tiun sumon, kiel donacon de via amanta frato ».

Post legado de la interesa letero, la gajeco pleniĝis min ankaŭ. Ŝajne, el la nuboj, Dio ĵetis la pecon da pano, malgraŭ nia malreligiemo. Ni interparoladis multe pri novaj aĉetoj, kiujn ni faros, ricevinte la promesitan « donacon ». Ni decidis: paginte la ŝuldojn, ni aĉetos la libron: « Kapitalo » de Markso, poŝhorloĝon, grandan tablon, novan lampon kaj unu funton da plej bona tabako. Poste ni ekpensis: kiel granda estas la sendota sumo? Kaj rezultis, ke ĝi estas minimume je 500 rubloj.

En la sekvinta tago mi deiris por miaj lecionoj, kaj Roberto restis ĉambre por atendi la leterportiston. Ni konsentis renkontiĝi ĉambre, post la lecionoj.

Rapidante, mi reiradis hejmen. Suprenkurinte 84 ŝtupojn de nia ŝtuparo kun batadanta koro, mi

eniris la ĉambron, esperante ekvidi la gajan vizaĝon de mia amiko. Sed, mirante, mi ekvidis nur malokupatan ĉambron. « Kien li foriris? » mi demandis min ne trovante respondon.

Sed Roberto revenis nek vespere, nek nokte. Jam de longe mi dormadis, kiam mi ekaŭdis frapon kaj homajn voĉojn post la pordo. Jam komenciĝas la mateno.

« Malfermu la pordon! »

Mi plenumis la peton kaj ekvidis ian mirindajn: du miaj kolegoj kondukas Robertson sub la ŝultroj; ĉiuj tri, precipe Roberto, estas malsobraj. Unu el la kondukintoj diris: « Kolego! Akceptu vian amikon, kiu estas tro eltrinkinta, kvankam la vino malutilas por lia saneco; la brando kaj biero, ankaŭ. Nun permesu saluti vin, ĉar via amiko promesas ekdormi, ne maltrankviligante vin ».

Roberto estas restinta meze de la ĉambro. Balanciĝante, per malklaraj okuloj li ĉirkaŭrigardis nian malriĉan ĉambron, kaj laŭte diris amatan spritaĵon: « Ekster blatoj ekzistas neniaj bestoj! »

— « Kio okazis? » demandis mi, nekomprenante.

— « La vivo estas batalo, senpardona batalo de la homoj... Ekkredu: la homoj ne havas bonajn sentojn. Ili manĝas unu la alian kaj ridas je siaj frat-oj. Nenia bona senteco ekzistas! La batalo vivas! »

Kuŝante sur la lito, li ĵetis sur la tablon paperan folieton kun malgranda argenta monero, kaj diris: « Jen ĉio, kio estas restinta. Morgaŭ ĝi taŭgos por aĉeti iom da bulko... » Li ekdormas. Mi prenis la papereton kaj tralegis:

« Volu akcepti, karega frato, la aldonitajn ses rublojn kiel donacon ». Malbona rido estas diven-ebla inter la linioj de la letero. Mi ekpensas...

Tra la malfermita fenestro eniras la malvarmeta aero de la frua mateno printempa. El post la tegmento de la domoj sin montras klara suno, kiu supreniras pli alten, boneme elradiante la lumon kaj varmon. Unu el ĝiaj radioj ludas sur la ora kruco de la turo preĝeja. Strange! La kruco ekbrilas tiel forte, ke la okuloj povas rigardi ĝin kun malfacilo.

Trankvila sonorilo alvokas la homojn por la frua preĝo. La tago komenciĝas. Bela kaj hela tago! Malsupre aŭdiĝas la homaj voĉoj. Urba formikaro ekvekiĝas: fiŝaj aĉetantoj alvenas; aŭdiĝas la babilado de la kuirstinoj; el vendejoj elflugas la fiŝaodoro....

Mi fermas la fenestron....


Originale verkita de V. ŜELGIN (Rusujo).


LA DOMO DE PIERRE CORNEILLE.

Kelkaj amikoj de beletristiko intencas aĉeti la naskiĝan domon de l' glora tragediaŭtoro Pierre Corneille (Kornej) en Rouen. En tiu domo li vivis nur ĝis la tria jaro. Poste li vivis apud Rouen, ĉe Petit-Couronne, kie pasis la pli granda parto de lia infaneco. Ni donas apude vidaĵon de tiu lasta domo, pri kiu Corneille konservis ĉiam kortuŝitan memoron.



Oni atente legu la avizon sur la paĝo 22^a (malsupre).





MALNOVA KRISTA PORTRETO.

Post nia artikolo pri la novaj dokumentoj rilataj je portreto de Kristo, kelkaj el niaj legantoj petis nin, ke ni enpresu la portreton aluditan je la fino de la artikolo de Pastro Ruspoli: tiu konservata ĉe Genova en la preĝejo Sankta Bartelemio.
Ni plezure kontentigas hodiaŭ niajn amikojn.



L' organizado de l' Onkloj. Originalo de VIKTORO RÁKCSI (Hungarujo).

Viktoro Rákcsi, kiun mi nun prezentas al la estimata legantaro de «Tra la Mondo», estas inter la plej ŝatataj nun vivantaj hungaraj verkistoj. La plimulto el liaj verkoj estas malgrandaj humorajoj, felietonoj, sed ili havas tian originalan ĉarmecon, ke ĝi ne estas imitebla de iu alia verkisto. Lia rakonta talento kreis specialan specon de humorajoj, kiu estas nomata laŭ lia literatura pseŭdonomo «Sipulusz», france «genre sipulesque», kaj jam havas multe da imitantoj. Liaj figuroj estas bonkoraj piuloj, kiuj petas ian ombron. Sed la desegno de tiuj ombropeladoj estas tiel diversa, ke neniam ili povas esti enuigaj, kaj ilia priskribo estas tiel humorplena, ke neeble estas ilin senride legi. Tiu talento mem estas tre grandvalora en nia epoko.

Gesinjoroj miaj! Rigardu min, la senesperigintan onklon! Mi bone scias, ke ni, onkloj, estas en la komedioj teatraj humoraj kaj amindaj gajuloj, kaj se l' aŭtoroj bezonas ian malsaĝaĵon, per ni ili fariĝas ĝin, sed mi certigas vin, ke tiel ne okazas en la vera vivo, en nia kasto, l' onkla kasto, tute konsistanta el gajaj kaj malgajaj, saĝaj kaj malsaĝaj viroj, kiel en aliaj klasoj de l' homaro. Sed mi mem portas pli multepezan juĝon ol aliaj, kion mi tuj montros al vi.

Mi estas, karaj gesinjoroj, trideksesjara fraŭlo, kaj miaj grizaj haroj jam komencas maldensiĝi. Dufoje mi havis okazon edziĝi. Unue, kiam mi estis dudekjara; sed tiam la elektitino ne konsentis, trovante min tro juna. Due en mia dudekoka jaro; sed tiam mi ne konsentis, trovante l' elektintinon tro maljuna. Do mi restis fraŭlo, kaj okupas la tronon de l' onklo en mia familio. Mi konsolis min, laŭ eble: kian ĝojon mi havos, post dudek jaroj, ĉar mi ne havos filon min forlasantan por esti soldato, kaj ne havos filinon, gardatan en la baloj, kie oni ĵetadas bierglasojn al la kapoj de la pacemaj familipatroj.

Mi havis ankaŭ onklon, kiu testamentis al mi senetagan domon kun ĝardeno. Tien mi translokiĝis, kaj proklamis, ke neniu estas pli feliĉa kaj kvieta, ol mi.

Vintre mi legadis la verkojn de miaj karaj klasikuloj en la varma ĉambro; printempe mi malsupretrancadis miajn arbojn, kaj inokulis la rozujojn; somere mi iradis en la Danubbanon, kaj aŭtune mi kuracis min per vinberoj. Tiel pasos kviete miaj tagoj ĝis mia morto, kaj la publika kompatato akompanos mian ĉerkon. Antaŭ ĝi kvar ĉevaloj, post ĝi la kompatato: tiel mi imagas mian enterigiron.

L' edzo de mia fratino malŝatis la brosfaradon, kaj

fariĝis barbiro. Li sin nomigis «dentbrosisto kaj barbiro». Li konservis nur unu el la ecoj de la brosista periodo de sia vivo: li drinkis, kiel brosisto. Li Luis en mia domo butikon, kompreneble duonpreze: mi ja estis onklo de liaj filoj! Li zorgeme kaŝis la metodon, laŭ kiu li sendentigas siajn pacientojn. Ne eĉ la plej maljunegaj leonoj memoras similajn murtremitantajn kriegojn, kiel liaj pacientoj aŭdigis. Li estus kaŝinta tiujn kriegojn ankaŭ, sed tio neebla estis. Maljuna surda homo loĝis najbarece. Li staris ĉiumatene apud la butikon, kaj ellasis ĝojlarmojn, ĉar la unuaj sonoj, kiujn li ekaŭdis de dudek jaroj, estis la kriegoj de la kuracitoj de mia kara parenco.

Pli eminentaj malsanuloj estis kuracataj per «ĝojgazo». Mi estis tre scivola pri ĝia konsisto, kaj foje mi vizitis lin en lia butikon.

— Kie estas la ĝojgazo? mi demandis.

Li montris la lumgaskranon, elstarantan el la muro:

— Jen!

— Kiel ĝi estas uzata?

— Mi malfermas ĝin, kaj ekbruligas. Punkto.

— Kaj ĉu ĝi estas bona por malsanuloj?

— Treege, ili ne kriegas tiel multe.

— Tio estas tre simpla! Nekredeble! kaj kio estas la fundamento de tiu ĉi eltrovo?

— La kuracarto opinias, ke la sendentigo fariĝas per tio malpli doloriga. Tio ĉi dentista laborĉambro, kiu havis antaŭ la pordo insignon de Hungarlando, el eltirataj dentoj, tute rabis la kvietecon de mia domo. Ĉiunokte aperis antaŭ mi la sendentigitaj ŝuistoj, blovantaj ĝojgazon al mia vizaĝo, kaj postulantaj siajn dentojn de mi.

Estante onklo, pro parenca devo, mi eltirigis de mi tri sanajn dentojn dum unu jaro. Feliĉe, dum la sama jaro tiel kreskis la nombro da sanaj dentoj eltiritaj, ke mia kara bofrato devis rifuĝon serĉi.

L' insignon de Hungarlando, faritan el eltiritaj dentoj, li forlasis, kaj mi metas ĝin ĉiam, okaze de naciaj festoj, ĉe la fenestron. La butikon mi luigis al birdkomercisto. La tuta ĉirkaŭaĵo fariĝis feliĉa, nur la supre dirita surdulo ploris senespere.

Dudek geknaboj estimas min, kiel onklon en mia familio. Mi havas nenian neordinaran nomon, mi estas nomata simple: Miĉjo. Nur unufoje ĝi estas en la kalendaro dum unu jaro, tamen okfoje ĉiuj dudek genevoj min gratulas okaze de tiu «nom-festo». Estas vere, ke ili kunportas belajn florojn,

deklamas belajn versetojn, kiuj ne estas verkitaj por mi, sed ne estas vere, ke ili min plezurigas. Ili disrompas mian pipon, grimpas sur miajn arbojn, eĉ falas de ili. La unua trinkas nur karbacidakvon, kiam li soifas, al la dua estas permesite manĝi ĉion, escepte abrikotojn, la tria ne povas sensurtutiĝi.... la dekkvina devas kininou ensorbi ĉiuhore, al la dudeka oni devas meti kotonon kun alkoholo en la orelojn, kaj al neniŭ estas permesite fumadi.

Kiel memori ĉion ĉi? Kompreneble mi konfuzas ilin: al knabo je la karbacidakvo mi ensorbigas la kininon; mi permesas sensurtutiĝi neniun, krom nur tiu, al kiu estas malpermesite; la knabo je l' abrikoto suĉadas l' alkoholumitan kotonon kaj al la knabo je l' kotono mi ŝtopas l' orelon per abrikoto; kaj ĉiuj fumadas en ia sekreta angulo de l' ĝardeno. Mi ne povas ilin distingi absolute!

Same okazas ankaŭ pri mia naskotago. Kiam ajn mi serĉadis inter la familiaj tradicioj, ĉiam mi trovis, ke la familianoj naskiĝis nur unufoje. Kiel okazas tamen, ke l' aro de miaj genevoj kvin, sesfoje min superŝutas per « naskofesta gratulado ». La nomfestaj scenoj rekomenciĝas pligravigitaj per tortoj kaj bakitaĵoj. La tuta familio ĉe mi malsanigas la ventron, kaj dum du monatoj mi renkontas riproĉajn rigardojn ĉiuflanke. Mi aŭdas ĉi tie kaj tie:

— Miĉjo dorlotas la geknabojn, tial ili ne obeas.

Tamen, kiam unu el la geknaboj sufokas mian instruitan papagon, mi al li instruas per bastono la pekobedaŭron, kaj mi aŭdas tion:

— Brutulo, li ne amas la infanojn, li amas nenion. Sinamema, maljuna frenezulo!

Kaj se mi regalas ilin per sola kafo, tiam mia nomo estas ankaŭ frenezulo maljuna, kaj eĉ avara:

— Kvazaŭ li havus iun, por kiu li ŝparus! Li elspezas nur por si mem... Kaj tiel plu.

Kiam mi intencas agrable dormi posttagmeze, malsanigas iu el miaj bofratoj, kaj li petas Miĉjon, ke li bonvolu promeniĝas la geknabojn en l' urbarbareto. Tiam jen estas la programo: Rompo de la fenestroj de l' elektra veturilo; boatpromeno sur la lago kaj enfalo; pafado al celtabulo, balancado kaj mara malsano; perditaj pilkoj, posttagmezmanĝo, butermakulitaj vestaĵoj; batalo kaj sanga maro; fine malaperinta knabo, longa serĉado, sekve malfrua reveno, nazkataro, terura dormemo, plorego; kaj mia rekompenco estas la nomo maljuna azenulo!

Mi havas en mia familio tri aŭ kvar karulojn. Ĉiuj havas belegajn antaŭtuketojn, sur kiuj estas bele broditaj « Karulo de Miĉjo ». Tiel mi almenaŭ scias, kiujn mi amas. Tiuj « nomitaj karuloj » estas la plej malbonaj infanoj en la familio. Eĉ Dio mem ne povus ilin obeigi.

Ili partoprenas en ĉiuj epidemioj, sen ili ne okazas disrompo de fenestro, tre ofte oni devas ilin tiri de antaŭ la tramveturilo, volonte ili rampas ĉien, de kie estas eble defali; la ĉerizojn ili manĝas kun kerno, kaj por ili la plej feliĉa tago estas, kiam ili povas manĝi pinglojn. Kaj la plej interesa en la afero estas, ke mi devas suferi pro ilia malboneco:

— Kiel vi povas ami tiajn sentaŭgulojn, Miĉjo? Via ja amas senmeritulojn! Via amo ilin plimalbonigos. Ili jam ne obeas eĉ al siaj propraj gepatroj!

Tiaĵojn mi devas aŭdi ĉie.

Ankaŭ oni ilin sendas al mi, kiam ili jam estas hejme netolereblaj, kaj mi pasigas horojn en mortigaj timoj, ke ili disrompos ĉe mi sian kolon. Por bridu iliajn danĝerajn pasiojn, mi aĉetas cent kilogramojn da sukero. Ili tiel plenigas sin per sukeraĵoj, ke dum semajnoj ili ekmalsaniĝas nur ekvidante da ili.

Kiel onklo mi ofte estas invitata de la familio, tagmezmanĝi. Tiam mi min vestas laŭ la inklinoj de l' infanoj. Unua makulas blankan vestaĵon kun speciala prefero, alia la nigran. Bedaŭrinde ili estas kapricaj, kaj alligas siajn inklinojn de tago al tago. La koloron de la vestaĵo ne atentante, ili malpurigas blinde kaj pasie, kaj mi revenas el la familiaj tagmezmanĝoj ĉiam kun makuloj, kaj mi prosperigas la ĉirkaŭajn vestaĵpurigejojn. Se mi estus filozofo, mi konsoliĝus pro tio, ke la suno ankaŭ havas makulojn. Sed al ĝi tio kostas nenion!

Okaze de epidemioj oni portas la sanajn infanojn al mi. Ofte dum semajnoj mi estas forigita de mia ĉarma loĝejo, kaj mi dormadas en la butikoj de la birdokomercisto, inter junaj kunikloj, kaj maljunaj remburitaj agloj. Ho! kiel bone mi fartas inter ili! Nenies el ili mi estas onklo! La alaŭdo, kanario, fringelo bele pepadas, kaj larmojn pro kortuŝiĝo mi forviŝas el miaj okuloj — per maljuna remburita tetrao.

Mia familio jam sciigis min alude, ke al bone edukita onklo konvenas reveni el Ameriko, kun granda havaĵo, kaj morti senfile, riĉege. Kiel eŭropa onklo, mi havas neniom da aŭtoritato. Tio min ĉagrenas treege.

Sed la plej forta interpuŝiĝo fariĝis kun miaj amataj parencoj, kiam mi aranĝis majan feston en mia ĝardeno por la genevoj.

Sciante, ke knabo ne povas havi pli grandan ĝojon, ol malpurigi, mi en la antaŭtago de la festo rekolorigis la tutan barilon, ĉiujn benkojn, seĝojn per verda, kaj ruĝa koloroj. Por pligrandigi ilian ĝojon, mi fariĝis multe da marĉoj en diversaj lokoj de l' ĝardeno kaj la korto. Mi ankoraŭ nun ploras, se mi rememorigas la ĝojon, kiun mi kaŭzis al la geknaboj. Kiel ili ekĝojis, ekrigardante l' unuan ruĝan makulegon tute freŝan sur la pantalonoj; kiom da ĝojo vidigis la ĉarmaj vizaĝoj, kiam Joĉjo sukcesinte ĵeti grandan ŝtonon en la plej grandan el la marĉoj, ni kaj ĉiuj dudek fariĝis kotkovritaj. Ha! la kompatinduloj! Aliokaze ili atingas tian rezulton nur post penado dum tuta posttagmezo!

Kaj ĉu oni scias, kian rekompencan mi ricevis pro mia boneco? Oni min nomis maljuna azeno, maljuna frenezulo, kaj kvankam la knaboj uzadis siajn makulitajn vestaĵojn dum jaroj, tamen mi devis aĉeti dudek novajn vestaĵojn!

Jen, ni rakontis la suferojn de l' onklo, kaj mi opinias, ke ĉi tiu stato estas netolerebla!

Ni stariĝu, onkloj-kolegoj! ni unuigu! Kaj poste ni edziĝu samtempe! Ekstermu ni la specon de l' onkloj, estu ni viroj, kaj patroj, tio kostas malpli da respondeco, kaj sufero.

Tradukis

RUDOLFO RAJCSY.





LA ŜIPO JACQUES CARTIER ELIRANTA EL LA HAVENO.

Vojaĝoj al la Polusoj.

Novaj esploradoj estas nune preparataj al la glaciaroj antartikaj. Se ni konas proksimume la regionojn, kiuj ĉirkaŭas la Maron Nordan, ni scias nenion aŭ preskaŭ nenion pri la spacoj de Suda Poluso. Laŭ la elserĉoj ĝis nun faritaj, oni povas opinii, ke, trans la pintoj sudaj de Ameriko, Afriko kaj Novzelando, kuŝas grandega aro da teroj tute kovritaj de glaciaĵoj, sesa kontinento tiel ampleksa, kiel Eŭropo kaj Aŭstralio kune. Kaj el tiu kolosa glaciaro liberiĝas grandegaj masoj, aro da terurega *icebergoj* (glaciomontoj), kiuj trairas la Sudon de Afriko kaj Ameriko.

Kia estas la vidiĝo de tiu mistera blanka kontinento, de tiuj *icebergoj*? Kiaj marfluoĵoj puŝas ilin al la regionoj, kie ili estas danĝeroj por la komerca marveturado? Kiaj ventoj regas en tiu senlinia oceano polusa suda? Tiuj problemoj havas do treege gravan intereson sciencan kaj praktikan.

Por provi ilian solvon, ĉiuj maraj nacioj preparas vojaĝojn al la Poluso Suda. Angla ekspedicio laboras jam sur Tero Victoria, en sudo de Novzelando. Leŭtenanto Shackleton de angla maristaro estas unu el la ĉefaj anoj de ekspedicio Scott, kiu atingis la punkton plej proksiman al la Poluso: $82^{\circ}17'$. Li kaj liaj kunlaborantoj ne povis trairi la 600 lastajn kilometrojn proksimajn al Poluso, tial ke iliaj hundoj mortis unu post alia pro tro grava laboro. Li anstataŭigis do ilin per aŭtomobiloj.

La problemoj estas ja malfacila: ĉu la petrolujo frostiĝos dum la marvarmaj temperaturoj? Li certigas, ke li ne timas tion. Li uzas ankaŭ ĉevaletojn siberiajn, kiuj elportas facile la malvarmon. La ekspedicio, elirinta en Okt. 1907, povos reveni nur post du jaroj.

Oni preparas ankaŭ skotan vojaĝon. Germanujo, Belgujo eĉ pripensas pri preparado de sudpolusaj misioj.


Fine la registaro franca donacis monon al D^{ro} Charcot, kiu en 1903 faris jam gravan esploradvojaĝon dujaran en polusaj regionoj, kaj kiu volas rekomenci siajn elserĉojn, kiam li havos ŝipon sufiĉe fortikan. Efektive oni ne povas uzi kiam ajn ŝipon, ĉar la feraĵoj aŭ ŝtalaj ŝipkorpoj de la ŝipoj ordinarnaj ne povas kontraŭbatali, eĉ dum kelkaj minutoj, premon de glacioj aŭ *icebergoj*. Nur lignaj ŝipkorpoj posedas rezistecon kaj elastecon necesajn por kontraŭbatali sukcese tiajn premojn. La ŝipkonstruistoj kutime ne scias konstrui tiajn ŝipojn: antaŭ 9 jaroj, ekspedicio angla klopodis du jarojn, ne trovante konstruiston kapablan liveri al ĝi bonegan ŝipon. La praktikon de la malnova konstruado konservis la franca provinco Bretagne, kaj S^{ro} Gautier, el Saint-Malo, akceptis liveri al D^{ro} Charcot la postulitan ŝipon, la *Pourquoi pas?* (Kial ne?)

Samtempe, oni volas atingi la Nordan Poluson. Nia figur-


aĵo prezentas la ŝipon *Jacques Cartier* pretan por eliri el la haveno; ĝi estas provizita per aŭtomobila boato, kaj ĝi forportas la plej bonegajn ilojn perfektajn. Li intencas iri en Norvegujo, poste al Nordo de Rusujo, al Maro de Kara, Nova Zemblo, kiu laŭ Nordenskjöld, enhavas gravajn dokumentojn biologiajn.

Fine oni scias ke Wellmann preparas trian ekspedicion al la Poluso per aerostato direktebla.

MARCEL FINOT.



LA FERDEKO DE ESPLORADA ŜIPO.



Marie d'Evray.

Noveleto, originale verkita de C. OXFORD, E. V. (Anglujo).

Noto de la verkintino.

Mi pensas, ke eble la legantoj miros pri la malgajeco de la du solaj noveletoj, kiujn mi sendis al tiu ĉi estiminda ĵurnalo; tial mi volas klarigi, ke ili estas el serio de skizoj pri virina karaktero, al kiu mi intencis doni la titolon: « Ses virinoj kaj la Ombro de la Viro ». Sed, bedaŭrinde, el la ses mi nur povis elverki du, kaj nun la tempo flugas, kaj mi timas ke mia vivo estos tro mallonga por, ke mi povu fini la serion, precipe pro tro da alia laboro pli grava. Tial, ho ve! la ĝojigaj ecoj de kelkaj el la aliaj, kiujn mi jam havis « en mia kapo » perdiĝos en la granda maro, kiu englutas tiel multe da geniaj verkoj, kiuj, laŭ la espero de siaj aŭtoroj, « igus la mondon paroladi ».

C. Oxford.

« Estas tute nekompreneble! Kie estas via imago? Jen pli ol dekdu skizoj, kaj ne unu el ili estas eĉ iom bona; kaj la via, F^{ino} Vallones, estas la plej senesperige ligna kaj senviva el ĉiuj. Kia utile vi venas al tiu ĉi kurso, se neniu el vi klopodas eĉ provi ilustrati la temojn, kiujn mi donas al vi, se vi ne penas realigi la scenon en via spirit-okulo? »

Tiel, dum ĉirkaŭ duono da horo la majstro kritikis la skizojn. Li estas altkreska, bruna viro, kun vizaĝo forte markita, kiu elmontras al la fizionimiisto la eksterajn signojn de terura interna barakto ĉe ia pasinta tempo en lia vivo.

Nuntempe, Edward Mortimer estas ĉe la plej alta grado de sia populareco, kiel pentristo same kiel artinstruisto, kaj en la tagoj dediĉitaj por instrui la arton desegni kaj pentri, lia studejo estas iom tro plenigita de gestudentoj. Estas neneigebla fakto, ke li havas mirindajn kapablojn por instrui, kaj la amaseto da gefraŭloj ĉirkaŭ li, aŭskultis plej atenteghe ĉiun vorton, akceptante liajn malafablajn dirojn kun trankvileco, kiu montras, ke ili atendas nenion pli bonan, kaj, se okaze, laŭda vorto estas elparolita de li, la feliĉa laŭdito estas gratulita — envida — malamita, flatita, laŭ la kutima maniero de la korteganoj de tiu ĉi mondo.

Turnante sin al la gestudentoj, post silenta rigardado al tiu skizo, kiun li ĵus nomis la plej malbona, li diris: « Kvankam sen espero, mi provos novan eksperimenton hodiaŭ. Mi decidis certigi, ĉu vi ĉiuj estas tiel malkapablaj kiel vi ŝajnas, ĉu vi povas fari ion pli ol korektan kopion de tio, kion vi vidas antaŭ vi, aŭ ĉu vi estas simple mallabor-emaj. Jam vi rimarkis tabulojn kaj paperon preigitajn por vi. Mi nun donas al vi temon por

ilustrati: « Epizodo ». Tute facila, vi vidas; ĉar vi ĉiuj, ĉe ia tempo en via vivo, aŭdis, aŭ vidis ion, kio sin fiksas en vian memoron; kio ajn estos taŭga, se nur ĝi sufiĉe interesas vin, kaj sufiĉe forte impresas vian spiriton por ebligi la reproduktajn sur papero. Nun, estas dek minutoj antaŭ la dekunua; tuj je la dekunua, vi komencos verki, kaj daŭros ĝis la unua. Ĉar kvieteco estas necesa, mi restados en la studejo por esti certa, ke vi ne estos malkvietigataj; la unua studento, kiu parolos, aŭ faros ian eviteblan bruon, estos petata eliri el la ĉambro. Por via propra honoro, mi esperas ke vi faros kiel eble plej bone. »

Tiel dirinte, li eltiris libron el sia poŝo, kaj sidiĝis sur komfortan seĝon en angulo de la ĉambro.

Rigardoj pro miro kaj amuziĝo iris de unu al alia, sed neniu kuraĝis fari ian rimarkon; ĉiu elektis lokon kun tabulo kaj papero, kaj dum la sekvintaj du horoj, nekutima kaj rava silento regis.

La fraŭlino, al kiu li estis espriminta siajn plej sarkasmajn rimarkojn, eksaltis kiam li parolis pri la nova eksperimento, kaj ĉe la titolo « Epizodo », ŝia vizaĝo ruĝiĝetis, kaj ŝiaj okuloj brilis pro ekscito, pli ol tio, pro triumfo, kvazaŭ ia longe atendita momento fine okazus. Ŝi nun sidas antaŭ sia tabulo kun mieno, kiu montras ke ŝi estas subpremita de forta emocio.

Eksonis la unua. Tiam estis ĝenerala surpriza moviĝo, la tempo estis pasinta tro rapide por tiuj, kiuj ne estis tiel lertaj kiel la aliaj.

Malrapide, la majstro fermis sian libron; pli malrapide remetis ĝin en sian poŝon; plej malrapide levigis kaj tiam diris:

« Vi nun turnos viajn tabulojn tiamaniere, ke la skizoj estu nevideblaj; vieliros el la studejo, mi ŝlosos

la pordon, kaj ni ĉiuj revenos je la dua por nia posttagmeza amuzado », parolante kun la malvarma sarkasma tono, kiun li uzis, kiam li sentis specialan malicon.

Voĉo laŭte resonis, kun rido, kaj rediris « Jes, nia posttagmeza amuzado ! »

Ĉiuj turnis sin por rigardi la kuraĝan parolintinon. Ŝi estis F^{ino} Vallones. Sed ilia surprizo pro ŝia rimarko (ŝi kutime estis tiel silenta) ŝanĝiĝis en miro dum ili rigardis. La ordinare pala vizaĝo, la malhela lumo en la okuloj, la indiferenta mieno estis malaperintaj; anstataŭ tio, la vangoj estis ruĝetaj, la okuloj brilegis pro preskaŭ sovaĝa, diabla lumo, kaj ŝi ŝajnis senspira pro eksciteco.

S^{ro} Mortimer spiregis kiam li ekrigardis ŝin. Tiu ĉi knabino havis neordinaran influon sur lin. Li sentis tiun ĉi influon de la momento, kiam ŝi unuafoje eniris lian studejon antaŭ ses monatoj. Li tute neeble povis klarigi la ensorĉon, ĉar ensorĉo ĝi estis, nek kontraŭbatali ĝin. Al li ŝajnas kvazaŭ li estus koninta ŝin antaŭe, sed ne povas memori kie, aŭ kiam, sed li nepre scias, ke kiam ajn tio okazis, tiam ŝi havis la saman influon. Kvankam ŝajne ŝi estas ĉiam ĝentila kontraŭ li, li tamen konscias, ke ŝi kaŝe mokas lin, kaj kiam ŝi rigardas lin, li komprenas ke pro nedifinita motivo ŝi kontraŭbatalas kaj malestimas lin.

Plie, kvankam li sentas neesprimeblan timon je ŝi, liaj tagoj estas lacigaj kaj liaj noktoj vera infero pro ŝi. La pasia amo, kiun li havas por ŝi, igas lin duoble sentema pri ĉiu ŝanĝo de tono, ĉiu esprimo pasanta en ŝiaj okuloj; tial, li furiozegas aŭ ofendiĝas pro la kaŝataj ridmokoj aŭ malestimaj rigardoj.

Tiuj ĉi sentoj igas lin pli severa kontraŭ ŝi, kaj kelkfoje la aliaj studentoj vere kompatas ŝin pro la kruelegaj, sarkasmaj rimarkoj pri ŝia verko, kiujn li faras, kvankam ili ne amas ŝin, kaj konsentas, ke li estas prava koncerne ŝian mankon de imago. Treege lerte ŝi faras desegnaĵojn de la figuro, kaj ŝia tekniko estas perfekta, sed ŝajne ŝi neniam estos pli ol lerta kopiistino de la naturo.

La tagmanĝa horo pasis sufiĉe rapide kun bruego

de konversacio kaj divenoj pri tio, kion diros la majstro, kiam li ekzamenos la skizojn, kaj konjektoj pri lia nova eksperimento. La plej timemaj inklinas forkuri, la plej kuraĝaj kaj senĝenaj antaŭvidas ĝoje la sarkasmajn rimarkojn, kiujn ili atendas.

Jeanne Valonnes ŝajne kvietigis post sia momenta ekscito, sed danĝera lumeto ankoraŭ brilas en ŝiaj okuloj, se oni atente observas ilin.

Fine, ĝenerala movo okazas, kaj studentoj grade malaperas de la manĝoĉambro, lasante Jeanne'on tute sola, kion ŝi ne scias dum kelkaj momentoj; sed kiam ŝi ekvidas, ke ŝi estas ja sola, ŝi kliniĝas sur la tablon, kaŝante sian vizaĝon sur siaj elstreĉitaj brakoj, kaj ŝia korpo estas skuata de ploregoj. Mallonge ŝi sidis tiel; tiam, levigante, kaj kvietigante sin per forta penego, ŝi paŝis en la studejon. Kiam ŝi eniris, la majstro jam kritikis la unuan desegnaĵon, kaj ĉiuj tro interesiĝis por rimarki ŝian treegan palecon kaj preskaŭ sovaĝan mienon, ĉar ili ĉiuj estis sentintaj, ke tiu ĉi estas fina provo, kaj plej bone estis verkintaj laŭ siaj kapabloj. Nun ili ricevas sian rekompencan: li parolas iom pli mal-severe ol kutime.

Almenaŭ kelkaj montras, ke ili povas fari ion vidindan.

Fine, alvenas la vico de la skizo de Jeanne Valonnes. Ŝi leviĝas, kaj detenante ĉiun signon de emocio, kun admirinda mieno de indiferenteco, ŝi malrapide marŝas al la tabulo, kaj pingligas sian paperfolion al ĝi, kaj tiel malrapide reiras sian sidejon, kun malestimema rideto sur sia vizaĝo, tia rideto, kiu ŝajnus terura sur ia ajn vizaĝo, sed duoble sur tiu de junulino.

Estis subita movado kaj murmuro, kiam la aliaj ekvidis la skizon.

Ŝi estis farinta ĝin tiel granda kiel la tuta amplekso de la papero, tial ĝi estas sufiĉe granda por, ke ĉiuj povu klare vidi ĝin, eĉ de la kontraŭa ekstremaĵo de la ĉambro.

Ĝi prezentas du virojn baraktantajn sur la rando de krutaĵo. Kruta marbordo dekstraflanke, kaj skiziloj vidiĝas en la mezproksimaĵo. Unu el la viroj




SENNOMA KRIMO.

Nekonalulo lancis bombon internen de minejo ĉe Giloswsk, provinco d' Ekaterinoslaw. Ok laboristoj estas mortigitaj.

Kun korpremo oni legas tian depeŝon, kaj oni demandas al ŝi, ĉu tiaj abomenindaĵoj estas eblaj?

Ŝajnas ke ministoj ne devus havi malamikojn, krom tiuj, kiuj perfide ilin atakas: karbgaso (grizu), karbpulvo, k. a., kiam ili penc laboras por donaci al siaj similuloj ĉiujn bonojn devenantajn de karbo.



kurbiĝas por ekkapti la kruron de la alia, kaj penas faligi lin teren. La skizo estas forta kaj konvinkiga verko, kaj inspiras al la vidantoj la senton, ke ili rigardas realan tragedion. Tiu ĉi sento venis al ĉiuj ĉeestantoj, kaj kiam la majstro turnis sin por rigardi kaj kritiki, regis tuta silento, kaj nenio povis esti aŭdita krom la spirego de la viro staranta antaŭ la desegnaĵo. Ŝajnis ke la silento daŭros senfine; tamen baldaŭ li parolis, duone turnante sin al la studentoj apudstantaj, sed zorge kaŝante sian vizaĝon, kaj ŝajnante ankoraŭ ekzameni la verkon, kvazaŭ li ne povus elporti la rigardojn de iliaj tro scivolaj okuloj. Lia gorgo evidente laciĝis pro troa parolado, kaj li devis halti por tuseti, kaj klarigi sian voĉon, kiu sonas pli rauke ol iam.

« Tiu ĉi estas tre bona skizo », li diris, « kaj mi gratulas Fraŭlinon Valonnes pri ŝia elekto de temo; ŝia lerta kaj konvinkiga maniero montri la... la.. « epizodon »; la vereco de lumo kaj ombro, kaj la bonega starigo de la du figuroj. Fakte ĝi estas sufiĉe bona por sentigi la rigardanton, ke ĝi estas ilustraĵo de vera historio, kaj mi ne povas trovi ian malĝustaĵon, kiu ne estus videbla de vi mem. »

Li turnis sian kapon al ili dum li elparolis la lastajn vortojn, sed krom iom da paleco, estis nenia nekutima esprimo sur lia vizaĝo, kaj neniu estis sufiĉe proksime por povi vidi lian agonian rigardon, aŭ lian tremantan buŝon sub la lipharoj.

« Ĉu estas aliaj desegnaĵoj por kritiki? »

La nervstreĉiĝo estis malaperinta. Nenio estis okazinta, kaj ĉiuj sentis kvazaŭ ia tondroplena nubo estus preterpasinta.

La malmultaj aliaj skizoj estis laŭdataj aŭ male, laŭ siaj apartaj meritoj, sed oni observis, ke lia voĉo rapide iĝis pli rauka, kaj lia gorgo ŝajne pli dolora.

Kiam li estis fininta la kritikadon, li turnis sin al Jeanne, kaj diris: « Mi ŝatus ekzameni vian skizon pli longe, se vi bonvole lasus ĝin, Fraŭlino Valonnes. »

Ŝi estis rigardinta lin dum la tuta tempo, ŝajne atendante ian elmontron de emocio, kaj fine sur ŝia vizaĝo vidiĝis esprimo de malestimego al lia ŝajna indiferenteco, sed samtempe duone nevola admiro por lia stoikeco (ŝi sola scias kiom li estas devigita deteni sin mem, por kaŝi tiel sukcese siajn sentojn), kaj kiam ŝi respondis, per iom ŝanceliĝa voĉo ŝi diris: « Certes, mi ĝojas ke ĝi tiom interesas vin. » Nur momente ŝi dolĉiĝis, ŝi tuj poste turnis sin al la aliaj. « Kunstudentoj, mi proponas voĉdonon de dankoj al S^{ro} Mortimer, tial ke li kritikis niajn skizojn kun tiel multe da pacienco kaj klopodo. Ĉu vi konsentas? »

Ĉiuj kore konsentis, kaj reparolante al li, ŝi transdonis la dankojn de la gestudentoj kun la malnova moka voĉo, aldonante:

« Permesu ke mi aldonu nian deziron ke vi, same kiel ni, estu ĝuinta la posttagmezan amuzadon, kaj ke tiu ĉi nova eksperimento estu sukcesinta laŭ via espero ».

Dum ŝi elparolis la lastajn vortojn, li direktis al ŝi rigardon de muta petego, kiu estus devinta dolĉigi iun ajn ne faritan el ŝtono, sed kiu nur iĝis ŝiajn okulojn brilegi pli hele kun triumfa kontentiĝo.

Li dankis ĉiujn malmultvorte, kaj aldonis, kiam li prenis la skizon de la tablo sur kiu ĝi kuŝis: « Mi opinias, ke mi povas certigi Fraŭlinon Valonnes, ke ŝia espero pri la sukceso de la... amuzado... estas plenumita. Ŝi almenaŭ donis sian plenan parton al ĝi. »

Denove rigardo de nevola admiro montris sin en ŝiaj okuloj, sed ĝi pasis tiel rapide kiel ĝi estis veninta, kaj kiam ŝi ekiris el la studejo, ŝi ekkantis malnovan francan popolkanton, kies unuaj sonoj ek-saltigis S^{ron} Mortimer, kvazaŭ li estus pikita, kaj li transiris la ĉambron iom rapide, kaj sidigis, ŝajne por rigardi ankoraŭ la skizon, kiun li ankoraŭ tenas.

La studentoj observas lin scivoleme; ili havas tiun nedifinitan sensacion, kiu sentigas ke ventego okazas ie en la najbaraĵo.

Je la deka vespere de la sama tago, Mortimer atendas Jeanne en lukse meblita salono. La granda lampo ne multe lumigas, kaj la servisto kiu enkondukis lin en la ĉambron, evidente obeis ian ordonon lasante ĝin tiel. Ĝi havas grandan ŝirmilon, tiel ke kvankam la ĉambro estas malluma, la lumo falas tute sur lian vizaĝon, ĉar li mekanike sidigis ĝuste, kie la servisto estis lokinta seĝon por li. Estas facile vidi, ke li suferas treege. Lia vizaĝo estas griza kaj markita de doloro; liaj okuloj estas sangvualitaj, kaj liaj manoj tiel tremas, ke li povas apenaŭ teni sian ĉapelon.

Post kelkaj minutoj li sentas, ke iu estas kun li en la ĉambro, kvankam li ne aŭdis iun eniri. Li turnis sin, kaj vidis Jeanne Valonnes, kiu staras antaŭ kurteno, kiu kaŝas pordon de alia apuda ĉambro.

Ŝi estas vestita je franco kamparana kostumo, kaj ŝia hararo estas aranĝita tute diference de ŝia kutimo. La ŝanĝo estas mirinda. Li eksaltas kaj leviĝas kun krio, kaj staras rigardante, nekapabla paroli. Tiam li duone krias, duone ekĝemas: « Vi! Dio mia, vi! kaj mi neniel divenis... ne eĉ la kanto hodiaŭ... mi pensis, ke ĝi estas simpla koincido. »

Ŝi ridis mallaŭte triumfan, kruelan ridon, kiu montris ĝuon pri la situacio, sed pli multe plezuron pro lia sufero. Kiam ŝi povis deteni sian voĉon, ŝi respondis:

« Koincidoj de tiu ĉi speco malofte okazas, mia kara sinjoro. Vi vidas ke mi pretigis min, kaj atendis vin. Mi sciis ke vi ne povos venki vian scivolon. Tamen mi atendis vin pli frue, ĝi estas apenaŭ la kutima horo por sociala vizito. »

Li estis refalinta sur sian seĝon, kaj neniel atentis ŝiajn vortojn; tiu fakto kiun ŝi rimarkis, sulkigis ŝiajn brovojn pro kolero, tial ke nun ŝia tempo alvenas, ŝi volas sentigi al li la plenan pezon de ĉio, kion ŝi volas diri al li. Sed antaŭ ol ŝi povis rekomenci, li parolis.

« Vi do vidis ĉion ».

« Jes, mi vidis ĉion, ĉion; sed mi faris nenian signon pri ĝi, ĉar mi ĵuris sur la loko mem, ke mi havos venĝon al la mortiginto ».

Ĉe la vorto « mortiginto » li ekremis, kaj volis paroli, sed ŝi haltigis lin, senkompate ripetante: « venĝon al la mortiginto ». Ŝi daŭrigis: « Sed mi ankaŭ ĵuris, ke mi faros tion laŭ mia propra maniero. La plejmulto el la virinoj estus kureginta en la vilaĝon, kun krioj, kaj kulpiginta vin tie ĉi kaj tie; mi ne similas aliajn virinojn; mi farus nenion tiel... vulgaran, tiel komunan. Via simpla morto de la pendigisto ne estus sufiĉe plaĉinta mian pli delikatan guston, aŭ mian apartan venĝdeziron ».

Daŭrigota.

C. OXFORD, Prez. de E. V. K.

Raŭplokotivo angla.

La nunaj lokomotivoj, kiuj promenas sur la vojoj, povas trairi la kampojn malmolajn kaj proksimume ebenajn, sed ne povas facile venki la kampojn malebenajn nek la deklivojn. La sekcio de mekanikaj transportoj de angla militistaro provas maŝinon, kiu estas tre interesa kaj promesas mirindajn rezultatojn. Jen estas ĝia principo: ĝi anstataŭigas, kiel oni proponis jam ofte, la veran vojon per falsa vojo konsistanta el senfina banderolo, kiu malvolviĝas inter la vojo kaj la radoj de la maŝino, kiu kondukas la katenon. Oni dispecigas tiel la pezon sur ampleksa surfaco, por malhelpi, ke la maŝino haltu en ŝlimo, en sablo, en mola vojo, kaj plie la maŝinaro ne suferas la ekfrapojn kaj reagojn tre fortajn de malebena kampo. Ĝi povas do facile kaj rapide transporti kanonojn kaj armilojn, tra teroj kaj kavajoj, ĝis lokoj tre altaj kaj krutegaj.


Tiu arta vojo konsistas el du katenoj lokitaj ĉiuflanke de la motoro kaj movitaj de radoj, el kiuj unuaj estas moviloj, aliaj reguligas la streĉon de la katenoj. La katenoj havas 32 dentegojn provizitajn de subbretoj, per kiuj ili mordas la teron. Per diferencigilo kaj haltigilo, oni agas sur direktiltrado, kiu donas diversajn rapidecojn al la lokomotivo.

Per motoro de 35 ĉevalpovoj, tiu vera raŭpo trapasas montojn argilajn altajn je 6 metroj, kies deklivo estas 45°.

La Telefotografio.

De la tempo, kiam S^{ro} Korn trovis rimedon por transsendi malproksimen fotografajn, multaj scienculoj serĉis aliajn rimedojn, por atingi saman rezultaton. Jen estas la du plej interesaj aparatoj antaŭ ne longe konstruitaj.

En la aparato *Belin*, la fotografado estas survolvita sur cilindro horizonta: ĝi estas fotografado kun karbo farita sur papero dika, kies reliefo estas proporcia je la intenseco de la tonoj. Tiu reliefo, nesentibla per takto, estas tamen sufiĉa por ke pinto frotanta sur la cilindro sentu ĝin kaj traduku ĝin per movo, kies amplitudo estas proporcia je la reliefo; tiu movo estas sendita al ortlinio, kiu apogas sin sur reostato alligita kun la ĉirkaŭo de la pila, kaj sendas en la flurondon sinsekvajn fluojn, kies intenseco estas do proporcia je la amplitudo de la movo kaj sekve je la intenseco de la tonoj. En la ricevloko, oscilas tre malgranda spegulo inter du bobenoj, kaj la movoj de la spegulo estas proporciaj je la intenseco de la fluo. La radio de lampo elektra refleksita sur la spegulo estas sendita al lento kaj produktas luman faskon, kiu moviĝas laŭ la osciladoj. Kontraŭ tiu lento estas tavolo de vitro sur kiu estas desegnita aro da tonoj, de la nigro absoluta al la blanko,



RAŬPLOKOTIVO ANGLA.

grade, de dekstre maldekstren. Laŭ la regiono la fasko toniĝas pli malpli, kaj la lento resendas ĝin al la sama punkto, pinto de la konuso de projekcio; ĝi impresigas paperon aŭ filmon survolvitan sur cilindro, kiu estas en kamero nigra kaj kiu moviĝas laŭ movo identa al tiu de la elsendluko.

Oni povas tiel ricevi figuraĵon pozitivan aŭ negativan, kaj eĉ figuraĵojn de malsama toneco, per kliŝaĵo tro hela aŭ tro malhela, kaj ankaŭ havi pligrandigaĵojn, per cilindro de pli granda diametro.

S^{ro} Berjonneau uzas alian procedon; li aliformigas unue figuraĵon transsendotan en similigravuraĵon: oni scias, ke tio konsistas el punktitaĵo tre maldika, en kiu la punktoj estas tiom pli proksimaj, ke la tonoj estas pli nigraj; en la regionoj nigraj, ili estas tre proksimaj, en la blankaj estas nenia punkto. La gravuraĵo estas survolvita sur cilindro de la elsendluko, sur kiu apogas fadeno el platino, alligita al la ĉirkaŭo de la flurondo; en tiun ĉi ĝi sendas sinsekvajn fluojn, kies daŭro estas proporcia je la daŭro de la kontakto de la fadeno kun la punktaĵo. Ĉe la ricevloko, tiuj fluoj reguligas la movon de speciala lumfermilo lokita sur la vojiro de la luma radiado elsendita de forta lampo, kaj impresas, proporcie je sia daŭro, folion de papero sentema survolvita sur cilindro sandiametra, kies movo estas sama kiel tiu de la elsendluko.

Oni vidas, ke la solvoj de la tiel interesa problemo de la telefotografio estos baldaŭ solvita, kaj oni povas pripensi pri la grandegaj aplikadoj de tiu eltrovo.

La Televidado.

Konstrui aparaton, kiu ebligos vidi en Parizo tion, kio okazas en New-York, ekzemple montri sur skreno de kinematografilo figuraĵojn, kiuj reproduktas scenajojn, kiuj okazas unu post alia en kia ajn loko, kvazaŭ oni tie estus, tia estas la problemo, kies solvon S^{ro} Armengaud serĉas de 30 jaroj. Sama demando, tiu de telefotografado, kaŭzis la eksperimentojn de Korn kaj de aliaj scienculoj, kiujn mi priskribis.

La aparato de S^{ro} Armengaud apogas sin sur la jena ceco de selenio: la rezisteco elektra de tiu metalo estas proporcia je intenseco de lumo aganta sur ĝin. La metodo uzas ankaŭ la filmojn kinematografajn, kies principo estas la persistemeco de impresoj lumaj sur la retino. Sed tio estas nur unu parto de la eltrovo. Estas necese ankaŭ, ke la fluo varianta laŭ la intenseco luma de ĉiu filmeto kinematografala alvenu al la ricevloko kun kondiĉoj tiaj, ke la variadoj elektraj realiformiĝu tuj en variadojn lumajn. S^{ro} Armengaud serĉas nune la finan solvon de tiu demando.

MARCEL FINOT.



TRANSPASANTE RIVERETON.

Marie d'Evray.

Noveleto, originale verkita de C. OXFENFORD, E. V. (Anglujo). (1)

« Kiel? venĝon, venĝon? Mia unua konsola penso estis, ke li estis kanajlo, kiu meritis sian sorton; li perfidis la virinon, kiun mi amis, kiel li perfidis aliajn antaŭe. »

Ŝi moke ridegis.

« La virino kiun vi amis — amis! Ha — ha — ha! Vi elektis strangan manieron elmontri vian amon, mortigante la viron, kiun ŝi amas. Ho, vi, karaj moralaj personoj! Ĉu vi neniam komprenos, ke ofte, tio kion vi nomas perfidaĵo kontraŭ virino estas ŝia savo? Ĉu vi iam pensis, ke tiu, kiu « perfidas » virinon, povas esti funde pli bona viro ol tiu, kiu vivas kun koro plena de malamo, severeco, maljusteco, kaj envio, ĉar li ne estas tiel amata kiel la alia? Mi estis diablino antaŭ mi konatiĝis kun li. Lia kamaradeco igis min — kompare — sanktulino, ĉar... mi amis lin. Sed vi, per via amo reigis min diablino, nerebonigebla, nehaltigebla diablino, por ĉiam. Mi revenigu la ŝercon — komedion — melodramon — kiel vi volas, al via memoro. »

Lj etendis al ŝi sian manon, kvazaŭ li petegus ŝin halti, sed ŝi daŭrigis senkompate per stranga unutona voĉo, parolante klare kaj decide, por ke li distingu ĉiun vorton.

Ĉirkaŭe antaŭ ses jaroj, ĉe malgranda franca vilaĝo, aperis du pentristoj, por pasigi skizan libertempon. Ili trovis la lokon ŝatinda, precipe ĉar ĉe la farmdomo kiun ili loĝadis, estis dek ses-jara junulino; sufiĉe bela, kaj ŝajne nescianta pri la manieroj de viro kontraŭ virino. Jes, vi, Angloj, havas emon por kredi, ke kamparaninoj estas feliĉege nesciantaj pri ĉio; tiu faciligas multajn por vi. Sed, se vi memoras, vi trovis tiun ĉi fraŭlinon pli bone edukita ol multaj el sia klaso, kaj tial ke ŝi estis loĝinta en Angloloĝando kun parenco dum la unuaj dek jaroj de sia vivo, ŝi parolis vian lingvon tiel bone kiel sian propran, kaj plie, ŝi havis iom kulturitan spiriton. Ŝi estis vojaĝinta kun la sama parenco, kaj tio donis al ŝi pli da facileco por la observo.

Nu! la ambaŭ viroj ekflamiĝis pro ŝi, kaj amin-dumis ŝin laŭ siaj respektivaj modoj propraj. Unu, kun malvarma, korekta, sed eminente honesta maniero, proponis sian manon, antaŭ ol fari ian rimarkon pri sia koro; la alia pasie proponis sian koron, petante la ŝian, interŝange, sed forgesante ŝajne, la edziĝan aferon. Okazis, ke la junulino havis mem varman pasian naturon, kaj jam ekam-inte lin, ŝi akceptis tiun ĉi amon kaj donis la sian kun fervoro tute malakorda je la malvarmkora, deknau centjara ideo. Ian tagon, alveninte ĉe la lokon, kie kutime ŝi renkontis sian amaton reven-antan de lia skizlaboro, ŝi ne trovis lin, tial ŝi daŭrigis sian promenadon al loko, kie ŝi scias ke la du viroj pentras kune. Dume, ŝi kantas malnovan popolkanton, kiu estas la konsentita signalo por montri al unu, kie estas la alia. Kiam ŝi alproksim-igis, ŝi aŭdis laŭtajn voĉojn, kvazaŭ ili malpacegus. Ŝi venas al la krucvojo, kaj vidas ilin starantajn, ambaŭ kun minaca mieno. Subite ili ekbatalas, tro

apud la rando de la krutaĵo por esti sendanĝere. Ŝi kuras, sed antaŭ ol ŝi povas atingi ilin, ŝi vidas unu perfide ĵeti teren la alian, kaj ŝajne intence puŝi lin super la randon sur la ŝtonegojn malsupren. »

Mortimer, sur kies fronto estas ŝviteroj, interrompis pasie:

« Ne, ne! je mia animo, ne! Mi ne faris ĝin intence, mi ĵuras. Kiam ni ambaŭ falis teren, li ankoraŭ tenegis min, kaj nur pro la instinkto de singardo mi liberigis min de li, kaj tiel farante, nekonscie donis al li la forpuŝon, kiu ekruligis lin sur la iom deklivan teren. Sed, je la nomo de Dio, se vi amis lin, kiel vi diras, kiel vi povis restadi senvorte, sensigne, tiel kviete? Kiam lia malviva korpo estis trovita en la vespero, kiel vi povis deteni la naturan impulson, kiu estus deviginta vin kulpigi min, se vi reale pensis, ke mi perfide mortigis lin, aŭ, almenaŭ diri tion, kion vi vidis, sammaniere kiel iu alia frenezigita virino estus farinta? »

« Ĉar, kiel mi diris, mi ne similas al la aliaj virinoj. Mi ne kriegas, ploregas, disŝiras miajn harojn kiel ili faras, kaj poste forgesas ĉion. Tio estus estinta pli bona por vi. Kiam mi vidis lin fali super la krutaĵon, mi sciis ke restas nenia espero; ĉar antaŭe okazis du aŭ tri « realaj » akcidentoj ĉe la sama loko, kaj la homoj estis tute mortintaj, kiam ili estis trovataj. Ne, mi reiris rekten al mia hejmo, kaj kiam mi iom kvietigis, mi ekdecidis planon pri venĝo al la viro, kiu estis forpreninta de mi mian amatulon; pli multe pli ŝatinda venĝo ol simpla kulpigo al la aŭtoritatularo; venĝo kies efektivecon mi ĵuras, ke mi havos, eĉ se mi devos atendi kvindek jarojn.

Post naŭ monatoj, la angla parenco kiu nutris min, mortis, testamentante al mi preskaŭ ĉiujn siajn posedaĵojn. Mi nun estas riĉa — kaj libera por plenumi mian planon de venĝo. Mi neniam forgesis ĝin, aŭ vin. Mi unue provis tiujn okupaĵojn, kiuj helpus min eniri la rondon de viaj profesiaj kaj socialaj kontaktoj, kaj, ĉar la Sorto laboris kun mi kaj kontraŭ vi, okaze mi trovis, ke mi havas apartan talenton por Arto. Tiam mi ekstudis, kaj post kelkaj jaroj, antaŭ ses monatoj, mi eniris vian studejon kiel studentino, konfidante al la longeco de la tempo pasinta, ŝanĝo de vestmodo, kaj super ĉio, al la ŝanĝo de esprimo, kiun la antaŭaj jaroj de mortiga malamo kaj malsatigata venĝdeziro estis farintaj en mia vizaĝo, por malhelpi, ke vi rekonu min.

Fine, hodiaŭ, vi mem donis al mi la okazon, kaj mia tempo estas alveninta! Vi estas nun ĉe la plej alta grado de via populareco; vi estas riĉa, vi havas ĉion, kion via koro deziras. Mi konas ĉiujn personojn, kiujn vi konas, kvankam mi klopodis, ke tre malofte vi min renkontu ie. De nun vi vidos min ĉie. Vi rigardas tiun ĉi emajlitan pendajeton; ĉarman, ne vere? Mi desegnigis la... « epizodon » laŭ klasika maniero por, ke ĝi ne altiru tro da atento — tio estus malhelpinta min. Kiam vi renkontos min, ĝi estos ĉiam antaŭ viaj okuloj. Mia voĉo estas iom ŝatata, ankaŭ la popolkanto, kiun ni ambaŭ konas tiel bone. Ĝin mi kantas, kiam ajn oni petos min, tio okazas ofte, kiam vi ĉeestos tie. Vi ne povos forkuri de mi. Mi estas tiel riĉa kiel vi; mi konas ĉiun

(1) Fino. Vidu la Aŭgustan Numeron.

movon, kiun vi faras, kaj, kie ajn vi penegos kaŝi vin, mi vin sekvos, ĝis unu el ni mortos. Mi diris, ke vi havas ĉion, kion via koro deziras, mi devas aldiri, escepte unu objekton. Mi plezurege vidis, ke kreskis en via koro pasio tiel granda por mi, kiel tiu kiun mi havis por li. Vi prenis mian amon de mi, kaj igis mian vivon tute malplena, mi volas, ke via vivo estu simile malplena, sed kun la aldonita doloro ĉiam vidi la virinon, kiun vi deziras tiel pasie; ĉiam aŭdi ŝian voĉon; senti la tuŝon de ŝia mano sur la via, kaj konscii la neeblecon ĝui ŝin. » Kaj ŝi ridis — ridegis... ridon, kiu ne estis bona por aŭdi.

« Virino, virino! ĉu vi estas diablino? »

« Mi jam diris, ke diablino mi estas, ne plu mi estas virino. »

« Sed ĉu vi havas nenian kompaton por mi? Mi amis vin, amis kaj deziris vin kun la amo kaj deziro de honesta viro, ne kun la malestiminda sentamo de satiruso, kiu estas ĉio, kion li havis por vi. Mi konis lin. »

Estis rimarkinde, ke nek unu nek la alia elparolis la nomon de la mortinto.

« Brave al vi — paroli malbone pri la viro, kiun vi mortigis. Kia ajn li estis antaŭe kontraŭ aliaj virinoj, por mi li havis tiel multe da respekto kiel por sia edzino. »

« Vi sciis, ke li estis edzo? »

« Jes, li diris al mi sian malgajan historion ne longe post sia alveno. Ho! ne estis ia perfido je lia parto. »

Li rigidigis, kaj ridis siavice, laŭte kaj maldolĉe. « Kaj... do... mi opiniis vin perfidita, insultita knabino, kaj la tutan tempon vi estis ne pli bona ol... »

« Atentu! » Ŝi eksaltis kaj staris kun flamaj okuloj, sed denove sidigis kun sarkasma rideto. « Ba! kion scias viro pri virino? Se ia ino konfesas sian amon por edzigita viro, li povas vidi nenian diferencon inter ŝi kaj tiuj virinoj, kiuj vendas sian korpon al la plej altpreze proponanto. Vi pretendas esti frapita de la ideo. Kion diras via Lord Byron? « Ĉu homa amo estas la frukto de homa volo? »

Lia edzino estis frenezulino en privata frenezulejo. Tio estis la motivo de liaj malestimindaj agoj antaŭ ol li renkontis min. Vi ridetas, sed virino ĉiam konas, el sia propra koro, ĉu viro havas veran amon por ŝi, aŭ nur momentan pasion. Eĉ se ĝi estus estinta alie, mi ne vidas, kial vi staras kiel moralisto; sed, kompreneble — mi forgesas — viroj neniam amas edziniĝintajn virinojn. Vi, moralisto! Ha-ha-ha! Kiu estas tiel perfekta kiel edzo kaj

patro por la okuloj de la Societo? Feliĉa la virino, kiu havas egalvaloran viron kiel protektanton kaj kunvivanton. Vi, moralisto! Kion diras la kara edzino pri viaj malgravaj platonikaj amikaĵetoj? »

Ŝajnas ke ĉar nun ŝi havas la eblon, ŝi devas ellasi ĉion, kion ŝi kaŝis en sia koro dum longaj jaroj, kaj ŝi parolas kun nekredebla, neesprimebla tono de koncentrigitaj doloro, malamo, maldolĉeco. Li volus paroli, sed ŝi ne permesas tion al li, kaj daŭrigas:

« Kiel multaj el viaj adorantaj studentinoj sentas vice post vice la karesantan tuŝon de via mano, kiam vi korektas la desegnaĵojn; renkontas la simpatian rigardon; aŭdas la mallaŭtan dolĉan tonon de via voĉo por ŝi sola, kiel ajn severa estas via maniero kontraŭ la aliaj? Kun mi, sole, vi ne povis amikiĝi, ĉar, en via koro estis timo al mi. Jes, timo. Instinkte vi sentis, ke mi estas via malamikino, kvankam vi ne povis diveni la kialon. Nu, vi scias nun, kaj mi kuraĝas diri, ke vi sentas kvazaŭ vi estus tranĉinta vian propran gorgon, donante al mi tian gloran okazon hodiaŭ. Mi intence malhelpis vin vidi miajn realajn kapablojn, ĉar la plej proksiman jaron, mi elmontrus grandan pentraĵon de la... « epizodo » ĉe la reĝa ekspoziciejo. Sed la okazo hodiaŭ estis tro bona por preterlasi ĝin.

Sed malfruiĝas. Mi devas diri bonan nokton. Ĉu ni renkontos nin morgaŭ? »

Ili ambaŭ starigis. La viro spireganta, diris malfacile kaj raŭke. « Nur tio mankis! Kia malbenita malsaĝulo mi estis. Kredu, aŭ ne, — kiel plaĉas al vi — ke estis vere senatente kaj senintence, ke li falis malsupren. Faliginte lin, mi simple uzis ordinaran baraktistan ruzon. Vi pensas ke mi daŭris vivi tiel longatempе forgesante, pro senkora indiferenteco. Mi juras al vi, ke ne pasis unu nokto en kiu mi ne plenumis la tutan agon denove en miaj songoj; ne unu momenton de vera trankvileco mi havis de tiu malbenegita tago. Ĉu vidante la signojn de doloro sur mia vizaĝo vi povas malkredi min? Mia vivo estis infero de tiu tago, kaj por kiu? por estajino, kiun mi kredis nescianta, konfidema knabino, kaj

por kiu mi estus tranĉinta mian manon antaŭ ol malbone agi aŭ malutili al ŝi ia ajn maniere. Ĉu aŭdante tion ĉi, vi povas ankoraŭ deziri plenumi vian diablan venĝon? »

« Mi amis lin, kaj vi mortigis lin. »

« Mi denove certigas, ke li ne taŭgis por meti sian manon sur konvenan virinon. »

« Mi amis lin, kaj vi mortigis lin », ŝi ripetis kvazaŭ ŝi ripet-us bone lernitan lecionon, per malpeza, malsprita voĉo, nun



REĜO EDUARDO.

SIDADANTA ANTAŬ

Reĝo Eduardo, la granda pacama regnestro, mendis portretan antaŭ kelke da tempo. Kompreneble tia eminentulo ne havas multe da tempo, por dediĉi al la necesa sidado. Nia

LA PENTRISTO.

fotografajo montras lin, kun milita kapvesto, antaŭ la pentristo. Por alia malpli alta persono, la zorgo antaŭsidadi pro la uniformo!

kiam ŝia ekscito iom eluziĝas.

« Li estus laciĝinta je vi post unu monato, se ne pli baldaŭ ».

« Vi estis mem tiel fidela, ne vere? Vi kiu fanfaronas pri via amo, por rajti kulpigi lin pri malfideleco ».

« Mia pasio por vi estis tiel forta kiel la lia, sed mi respektis vin, blinda malsaĝulo kiu mi estis, kaj detenis ĝin. Sed, poste. Viro devas havi edzinon. Mia koro estis fidela al vi la tutan tempon ».

« Do vi mem perfidis la virinon, je kiu vi edziĝis ».

« Eble, laŭ vi, kiu ne volas vidi unu eron da boneco en mi. Sed, malgraŭ viaj mokaj vortoj, mi estis fidela al ŝi, ĝis vi eniris mian studejon; ĝi estis vi, kaj nur vi, kiu revekis la pasion. Vi rememorigis la malnovan Marie D'Évray, per via maniero, via muzika voĉo. Vi estis beleta, nun vi estas belega! Malgraŭ viaj maldolĉeco, moko, malafablaĵoj, ĉio, kontraŭ mi, mi amas vin per la sola amo de mia vivo. Ĉu vi ankoraŭ havas nenian kompaton aŭ malseverecon por mi? »

« Kion mi povas fari? Nenio ŝanĝos la fakton, ke mi amis lin kun tia forto, ke kiam vi mortigis lin, vi mortigis ankaŭ mian koron, mian animon. Ili estas mortintaj. Mia vivo estas malplena — senespera. Mi vivis per unu deziro sola: venĝi lian mortigon. Tion plenuminte, mi ne zorgas, kiel baldaŭ mi mortos mem ».

La pasio pasis, kaj ŝia voĉo nun havis nur tonojn de treegaj laceco kaj doloro.

« Tre bone! Mi akceptas la situacion. Mi mortigis lin, kaj vi venĝos lin. Ankoraŭ bone! Sed, per Dio, vi enkorpiĝinta diablineto, vi ne povos havi ĉion, kio plaĉos al vi, vi ne faros ĉion, kion vi volas! »

Antaŭ ol ŝi sciis kion li intencas, li ekkaptas ŝin, premante ŝin ĝis preskaŭ ŝi svenas. Ŝi baraktas, sed li nur premas ŝin pli forte, kaj liaj okuloj brilas je lumo de frenezeco. Lia mano leviĝas ĝis ŝia gorĝo, sed subite, li ŝajne ŝanĝas sian intencon. Li kovras ŝian vizaĝon per varmegaj pasiaj kisoj ĝis li mem estas senspira; tiam, forĵetante ŝin teren, li kuregas el la ĉambro, kriante:

« Estu malbenita. Vi pereigis mian vivon! »

La morgaŭan tagon la ĵurnaloj raportis la surprizan novaĵon pri la subita morto de la fama pentristo, Edward Mortimer. Sur lia skribotablo estis trovita noto, kiun li estis skribinta kaj evidente estis metonta en koverton apudan ankoraŭ ne-adresitan. Sur ĝi estis la vortoj: « Mi timas, ke mi malkontentigos vin. Vi forgesis la oftan mankon inter la taso kaj la lipoj. »

Lia edzino, ĉe la enketo, diris ke ŝia edzo kutime uzis kloralon pro maldormemo; tial, oni supozis ke li sensingarde ensorbis tro da tiu drogo, kaj ke ĝi venkis lin antaŭ ol li havis sufiĉe da tempo por kuŝiĝi.

Egale surpriza estis la novaĵo, ke Fraŭlino Valonnes, aŭ pli ĝuste, Marie D'Évray, kiel oni eksciis pli malfrue, estis en la vespero de la sama tago, ĉe sia vespermanĝo, kun la vesperĵurnalo antaŭ si, en frenezeca stato, murmurante al si: « Perfidita!... Perfidita! » Pro la graveco de ŝia stato la kuracistoj diris ke ŝi neniam resaniĝos.

Kvankam la lasta okazintaĵo sekvis tre rapide la unuan, neniu suspektis ian kunligon inter la du, precipe ĉar la nekaŝita malamikeco de la majstro kaj studentino estis ĉiam kaŭzo de amuziĝo por la gestudentoj; sed la kelkaj, kiuj estis ĉeestintaj la posttagmezan kritikadon de la skizoj, kaj kiuj memoris tiun de Jeanne Valonnes, divenis ke io restis post la sceno, precipe kiam la sekvintan jaron ili aŭdis pri granda pentraĵo montranta du virojn interbatalantajn sur la rando de krutaĵo, kiu pro sia lertfariteco, estis elmontrita en la Reĝa Akademio, drapirita de krepo.

Tiuj malmultaj sentis, ke ja estis ventego kiam majstro kaj gestudentoj renkontis sin la lastan fojon, sed je ilia honoro, estu dirate, ke neniu el ili murmuris eĉ unu vorton pri sia suspekto.

C. OXENFORD.

Prez. de E. V. K.

FINO.



MULAI HAFID.

Abd el Aziz estas difinitive venkita de sia frato Mulai Hafid.

Franco kaj Hispanujo, al kiuj la konferenco de Alĝesiras donis iajn plenumajn privilegiojn rilate la farotajn raformojn, faris bonvolan verkon iniciatante noton proponotan al siaj kunsuskribintoj.

Krom unu nacio, kies rolo iom malklara estas sufiĉe konata, ĉiuj statoj interesataj faris al tiuj lojalaj proponoj akcepton indan de la saĝeco, kiu ilin inspiris.

Mulai Hafid mem akceptis la principon de tiuj proponoj, kiu estas la rajtigo de la akto de Alĝesiras.

Oni povas do esperi, ke la maroka afero, en sia nova fazo, ne kaŭzos fulmotondron en la eŭropa ĉielo.

Aliparte, la venko akirita de kolonelo Alix kontraŭ «harka» de 20.000 Marokanoj estos montrinta, ke, se Francujo estas pacema kaj grandanima kontraŭ siaj malamikoj, ĝi scias respektigi sian standardon kaj la Francan bonfamon: unu Franco batalis venke kontraŭ kvin malamikoj ekscititaj de la plej akra fanatikismo, renovigante la heroaĵojn de la unuaj almil tintoj de l' alĝeria lando.

Kredu al vi!

de LEV NIKOLAEVIĈ TOLSTOJ.

Kredu al vi, junuloj kaj junulinoj elirantaj el la infaneco. kiam, unuafoje, en via animo aŭdiĝas la demandoj: kiu mi estas, por kio mi vivas, kaj por kio vivas ĉiuj homoj ĉirkaŭantaj min? Kaj precipe tiu plej ekscita demando: ĉu mi kaj ĉiuj homoj min ĉirkaŭantaj vivas *vere*? Kredu al vi, kiam je tiuj ĉi demandoj prezentiĝos respondoj ne konsentaj kun tiuj inspiritaj al vi dum la infaneco, ne konsentaj kun via vivo. Ne timu pro tiu ĉi malkonsento; kontraŭe, eksciu, ke ĝi montras tion plej bonan, kio estas en vi, tiun diecan komencon, tion, kio en la vivo estas ne nur la ĉefa, sed la sola senco de nia ekzistado. Tiam, kredu ne al konata persono — al Janĉjo, Peĉjo, Eliznjo, Manjo, al filo aŭ al filino de laboristo, de komercisto aŭ de vilaĝano — sed al vi, al tiu eterna, prudenta kaj bona komenco, kiu troviĝas en ĉiu el ni, kaj kiu, la unuan fojon, vekiginte en vi, aŭdiĝis al vi tiujn demandojn tiel gravajn en la mondo, kaj serĉas kaj postulas ilian solvon. Ne kredu tiam al homoj, kiuj kun malsevera rideto diros al vi, ke ili iam serĉis respondojn je tiuj demandoj, sed ne trovis ilin; ĉar oni ne povas trovi aliajn, krom tiuj alprenitaj de ĉiuj.

Ne kredu al tiu ĉi, sed kredu nur al vi, kaj ne timu pro via nekonsento kun la opinioj kaj pensoj de l' homoj vin ĉirkaŭantaj, se viaj nekonsentaj respondoj estas diktitaj ne de viaj personaj deziroj, sed de la deziro ekplenumi la volon de la forto, kiu donis al vi la vivon. Kredu al vi, precipe kiam viaj respondoj devenintaj de tiuj eternaj komencoj de homa saĝeco konsentas kun la instruoj de Kristo en ilia plej alta religia signifo.

Mi memoras, kiel mi vivis, kiam mi estis 15-jara, kaj kiel mi subite iris de l' infaneco, en kiu mi vivis ĝis tiu tempo, al la nekonato, kaj, unuafoje, mi komprenis, ke mi devas vivi per mi mem, devas elekti mem mian vojon, devas respondi mem pri mia vivo de post tiu komenco, kiu, tiel dire, ĝin donis al mi.

Mi memoras, ke mi tiam vidis neklare, sed profunde sentis, ke la ĉefa celo de mia vivo estas la atingo de l' bono, de l' bono en la senco evangelia, en la senco de l' sinforgeso kaj de l' amo. Mi memoras, ke tiam mi provis vivi tiel, sed tio ĉi daŭris ne longe. Mi ne kredis al mi, sed mi kredis al tiu memfida, triumfanta saĝeco homa, kiun ĉio ĉirkaŭanta inspiris al mi konscie kaj nekonscie; kaj mia unua vekigo estis anstataŭita per difinitaj, kvankam diversaj, deziroj al sukceso antaŭ la homoj: vivi por eminenteco, por instruado, por gloro, por riĉeco, por forto, t. e., por tio, kion ne mi, sed la homoj opiniis la bono.

Tiam mi ne kredis al mi, kaj nur post multaj dekoj da jaroj perditaj por atingi mondajn celojn, kiujn mi atingis aŭ ne atingis, mi vidis ilian senutilecon, ilian vanecon kaj eĉ ofte ilian malutilecon, mi komprenis, ke tio sola, kion mi ekpensis 60 jarojn antaŭe kaj al kio mi ne kredis tiam, povas kaj devas esti la prudenta celo de l' penoj de ĉiu homo.

Kaj kiel alia, kiel plej ĝoja por mi kaj plej utila al la homoj estus mia vivo, se kiam la voĉo de la vero, de Dio, unuan fojon parolis en mia animo ankoraŭ ne delogitan de la allogoj, tiam mi estus kredinta al tiu ĉi voĉo kaj fordoninta min al ĝi!...

Jes, karaj gejunuloj, ne sub la influo de l' ekstera inspiro, sed sub via propra inspiro, sub la inspiro de via koro mem, vekigu al la konscio de la graveco de via vivo; jes, ne kredu al la homoj, kiuj diros al vi, ke viaj celoj estas nur neplenumblaj revoj de l' juneco, ke ili ankaŭ tiel revis kaj celis, sed ke la vivo baldaŭ montris al ili, ke ĝi havas siajn postulojn, kaj ke oni ne devas naski fantaziojn pri tio, kio povus esti nia vivo, sed penadi, laŭ la plej bona maniero, konformigi sian vivon al la vivo de l' ekzistanta societo kaj fariĝi utila membro de tiu ĉi societo. Ne kredu al la jena delogo, multe fortiĝinta en nia tempo, ke la plej alta celo de l' homo estas la helpo al la rekonstruo de societo ekzistanta en konata loko, en konata tempo, uzante por tio ĉi ĉiujn eblajn rimedojn, eĉ tiujn tute kontraŭajn al la moralo. Ne kredu al tio ĉi. Tiu celo estas sensignifa kompare kun la celo montrata en vi de tiu dieca komenco, kiu troviĝas en via animo. Tiu ĉi celo estas malvera, se ĝi permesas forlasi la bonan komencon.

Ne kredu, ke la efektivigo de l' bono kaj de l' vero estas neebla en via animo; ne nur ĝi estas ebla, sed via vivo kaj la vivo de ĉiuj homoj devas esti dediĉataj al tiu realigo; ĉar nur tiu efektivigo kondukas ne sole al la plej bona rekonstruo de l' societo, sed al la tuta bono de l' homaro, kiu estas antaŭdifinita por ĝi, kaj kiu fariĝas nur per la personaj penoj de ĉiu aparta homo.

Jes, kredu al vi, kiam en via animo naskiĝas ne la deziro superi la aliajn homojn, distingiĝi de ili, vivi por potenco, gloro, vivi por savi la homojn, por liberigi ilin de malutila konstruo de vivo (tiaj deziroj ofte anstataŭas la deziron al bono), sed la fervora deziro fariĝi pli bona, mi ne diras: perfekta, ĉar tia penso estus malhumila; sed mi diras fariĝi tio, kion volas tiu Dio, kiu donis al ni la vivon, malkovri tion enmetitan en nin, similan al Li, tiun diecan komencon, kiel diras la vilaĝanoj.

Kredu al vi kaj vivu streĉante ĉiujn viajn fortojn, por obei la ordonon de Dio montritan en vi, kaj vi faros ĉion, kion vi povas fari por via bono kaj por la bono de la tuta mondo.

Serĉu la Dian reĝecon kaj ĝian veron, kaj la cetero venos al vi.

Jes, kredu al vi en la grava momento, kiam, unuafoje, en via animo brulos la lumo de l' konscio pri via dieca deveno. Ne estingu tiun ĉi lumon, kaj per ĉiuj viaj fortoj konservu kaj flamigu ĝin. En la ekflamo de tiu ĉi lumo estas la sola granda kaj ĝojiga senco de l' vivo de ĉiu homo.

Esperantigis MIĤO AĈLO.
Rusujo.





EN WEISSER HIRSCH. — MANĜOSALONO EN HOTELO.

Ce la Kvara.

Niaj legantoj jam sufiĉe legis aŭ legos en sia nacia gazeto plenan raporton de la laboroj, kunsidoj kaj festoj de la Dresdena Kongreso. Ni do ne volas ankoraŭ unufoje presigi similan protokolon. Tamen ni opinias, ke estos tre interese aperigi personajn impresojn, originalajn detalojn speciale por Tra la Mondo kolektitajn. Jen la rakonto de nia amiko kaj kunlaboranto Pro Bord, kiu ĉeestis la kvar kongresojn kaj sekve povis fari instruantajn komparojn.

Post la Tria, mi kredis, kiel la plimulto, ke la Kvara ne povus atingi la saman gradon de perfekteco, allogeco kaj fervoreco. Mirinde! la Dresdena Kongreso ankoraŭ superis sian antaŭulon pri multaj punktoj. Neniaj ĝis nun la Kongresanoj estis en tia arta atmosfero. Neniaj ili estis havintaj, kun tiom da videbleco, la oficialan partoprenon de la registaro, de la urbestro, de la eminentularo. Nur la vidintoj, la ĉeestintoj komprenos la novan grandan venkon de Esperanto, memorante la belegajn spektaklojn de tiu ĉi mondfama semajno.

Ciumomente oni sentis la amikan helpon de Lia moŝto, la reĝo de Saksujo, kies reprezentanto, Sr^o von Criegern, reĝa privata sekretario, ĉeestis la solenan malfermon de la Kvara. La Saksa ministro de P^u publika instruado, la Dresdena ĉefurbestro, la delegitoj oficialaj de Usono, Japanujo, Ĉilio, Rumanujo ankoraŭ ne timis publike saluti la lingvon internacian Esperanto, kiel la plej grandvaloran ilon de Progreso kaj Paco.

La Kvara estis ankoraŭ pli internacia kaj laborema ol la Tria. Almenaŭ 1500 kongreskartoj estis liveritaj al esperantistoj alkurintaj el 42 malsimilaj landoj. Okazis pli ol kvardek specialaj kunsidoj de la profesiaj kaj fakaj societoj. Kiel zumanta abelaro, nia bruega ĝojega aro ĉiutage plenigis la ĉambregojn de la akceptejo; senĉese, antaŭ la okuloj mirigitaj kaj favoremaj de la Dresdenanoj, trapasis la ĉefajn stratojn beligitajn de la verda flagaro; senpage uzis kaj uzadis la komfortajn tramojn de la urbo, kaj amase partoprenis koncertojn, ekskursojn neniam ĝis nun tiel bone aranĝitajn.

Sed neniam medalo estas sen posta flanko. Do mi notis, ne volante ofendi la Kvaron, la malfortajn flankojn de la Kvara kompare al la Tria. La oficiala akcepto de Zamenhof ne estis publika, kaj oni ne vidis en la Dresdena strataro, kiel en Anglujo, soldatan eskorton, multkoloran sekvantaron, brutegajn ovaciojn, grandan popolan manifestacion. Oni tre plendis

pri la manko de utilega skriboĉambro. Domaĝe ke la kongresa gazeto ne presigis ĉiutage la resumon de la kunsidaj laboroj. Ankaŭ la servistaro de la Central theater tunelo, precipe dum la unuaj tagoj, estis iom nebona pri la rapideco. Fine, por la prezentado de Ifigenio en la Operdomo, oni vendis trimarkajn biletojn ne dirante al la malfeliĉaj aĉetantoj, ke ili nur havus la rajton stariĝi sur la piedoj, kaj mi pasigis la unuan



EN WEISSER HIRSCH. — AKCEPTEJO.



ALVENO DE LA GEKONGRESANOJ VAPORŝIPE EN MEISSEN.

Fot. Leroy.

akton sidanta sur ŝtuparo kaj rigardanta honestan teatroficiston sur sia seĝo dormetantan.

Sed lasu ni tiujn ne gravajn kritikojn, okazintaĵojn sendube neeviteblajn ĉe tia vastega organizo. Aliajn glorajn venkojn gajnis la Kvaro. Nun mi prezentas al vi mian kongresan kunulon kun liaj praktikaj kaj tute neordinaraj impresoj. Li estas profesoro de matematikoj kaj liaj plej granda plezuro kaj okupado konsistas ciferojn vicigi kaj statistikojn verki ĉie kaj pri ĉio. Tial la Kvara plene kontentigis lin. Li kalkulis ke, por alporti la diversajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn de la kongresistaro, estus necesa unu regimento da 2000 soldatoj. Poste, li trovis, ke la teleroj metitaj unu sur la alian, atingus altecon da du kilometroj t. e. da pli ol ses Eifelturoj; kaj tuj li aldonis, ke, se ĉiuj kongresanoj farus vivantan piramidon, la plej altigito povus manĝi sur la plej altigita telero.

Ian tagon, agrable sur Elbo ni ŝpiradis kaj ravan pejzaĝon avide mi rigardadis. Apude, mia matematikulo krajonis, krajonis.


— « Kion vi faras ? » mi diris.

Unue, silento, sed post kelkaj minutoj, kun mieno de venkinto, li ekkriis:

— « Ho! kiom da kilometroj la 1500 gesamideanoj trapasis por alveturi ĉe la kongresurbon!

Por piediri la saman kvanton da kilometroj, sep leterportistoj devus marŝi ĉiu dum tridek jaroj... »

Alifoje mi demandis lin kiomaj estus la elspezoj de la fremduloj, kaj tuj li akiris la sekvantan rezultanton: ni metos almenaŭ unu milionon da markoj en la poŝojn de la Dresdenaj loĝantoj.



EN MEISSEN.

La urbestro kaj la Majstro ĉe la balkono

Fot. Leroy.



EN WEISSER HIRSCH. — HOTELA ĜARDENO.

Tamen unufoje mia statistikulo preskaŭ sufokis min. En la luksa operdomo, Reicher kaj lia aktoraro ĵus finis la admirindan prezentadon de Ifigenio. La aŭskultintaro entuziasmigita freneze aplaŭdadis kaj ĝis ses fojoj venigis la kuraĝajn talentplenajn aktorojn sur la scenejon. Tiam mi kliniĝis al la orelo de mia ciferulo kaj mallaŭte mi diris:

— « Ĉu vi ne sentas koran emocion? Mi estas tute kortuŝita kaj neniam mi forgesos tian vesperon ».

— « Jes! jes! li respondis, se oni estus kaptinta la energion donitan per la aplaŭdantaro, oni havus sufiĉe da forto por elektre lumigi la urbon dum almenaŭ kvin horoj ».

La senkorulon mi preskaŭ insultis.

Ja por la unua fojo, Esperanto sukcesis enpenetri la artistan muzikan mondon. En tiu ĉi urbo de Belaj Artoj, la Kvaro donis al ni senkomparajn esperantajn koncertojn, kie oni aŭskultis ne amatorojn, sed la plej famajn muzikistojn, kantistojn, kantistinojn de Germanujo. Jen la muzikistaro de la 2^a Königl. Sächs Grenadierregiment, orkestro kiun oni povas kompari kun la Pariza orkestro de Colonne. Jen la Horoj, la gekantistoj de la landa teatro de Prago, de la

Dresdena operdomo, de la reĝa korto, kiuj naskis senfinan entuziasmon kaj definitive montris la belsonecon de nia lingvo per kantaĵoj de Wagner, Schuman, Mozart, Gounod, k. t. p., kies tekstojn esperantigitajn ni sekvis en la kongresa gazeto. Neniam mi forgesos la novan senton donitan al mi per la bonekonata ario de Faust: « En Tule reĝo vivis... » tiel harmonie kantita de Margareto esperantista.

Mi ne volas fini, ne parolante iom pri la mirindaj ekskursoj en Meissen kaj Wehlen. Ili estis triumfaj tagoj por Esperanto. En Meissen miloj kaj miloj da homoj atendis nin kun du muzikistaroj ludantaj « Espero » kaj faris longan



Fot. Leroy.

300 GESAMIDEANOJ VIZITAS LA MALNOVAN KASTELON DE POTSDAM.


Post la Triá oni estis mirigata. Post la Kvara nenio povos plu surprizi nin. Jam malbonaj profetoj antaŭvidis la proksiman finon de la jara kongreso. Jen la respondo: En 1909 okazos du kongresoj, unu en la malnova mondo, en Hispanujo; unu en la nova mondo, en Usono.

BORD.



KONVERSÁCIA ĈAMBRO DE L' GESAMIDEANOJ EN WEISSER HIRSCH.

Pro nova vojaĝo de nia direktoro ni devis akceli la preparon de tiu numero, kaj ne povos kiel kutime enpresi tiom da epizodaj vidaĵoj de la kongreso.



ARTISTA AŬ LITERATURA VIVADO



Lev Nikolaeviĉ Tolstoj.

Por lia 80-jara jubileo.

Antaŭ unu monato okazis la 80^a datreveno de la naskiĝo de l' fama filozofo Tolstoj. «Tra la Mondo» ne povis preterpasigi nerimarkite tian gravan okazaĵon: ni do enpresas en tiu numero verketon, kiu bone karakterizas la spiriton de l' majstro, kies vivadon afable priskribis por vi, amikoj legantoj, sampatrujanino de la eminenta literaturisto.

En la jaro 1908^a, la 28^{an} de aŭgusto, okazis la 80^a datreveno de l' tago, kiam naskiĝis L. N. Tolstoj. Ne facile estas per tia mallonga skizo prezenti tiun enhavriĉan vivon, — tamen ni penu iom konigi almenaŭ la plej eminentajn okazintaĵojn de la vivo de L. N. kaj montri la ĉefajn gradojn de lia spirita evolucio.

Patraflanke, L. N. devenas de l' antikva grafa gento de Tolstoj, kaj patrinaflanke — de l' ankoraŭ pli antikvaj princoj Volkonski.

Li frue perdis siajn gepatrojn. Sian patrion li tute ne memoras; ŝi mortis, kiam li havis unu jaron kaj duonon, naskinte lian pli junan fratinn Marja Nikolaevna. Tamen, laŭ la rakontoj de l' parencoj, li konservis en sia animo la plej delikatan kaj ravan figuraĵon de sia patrino. Li konsideris ŝin, kvazaŭ sanktulino kaj eĉ preĝis al ŝi dum la malfacilaj minutoj de sia vivo. Kelkaj trajtoj de ŝia karaktero estas donitaj de li al la principino Marja Bolkonskaja per la romano «Milito kaj Paco».

La patron li bone memoras, kiel inteligentan, noblan, bonan kaj justan homon; sed li mortis, kiam L. N. estis 9-jara. Lia onklinjo, aŭ pli ĝustadire, malproksima parenicino, Tatjana Aleksandrovna Ergolskaja, kiu zorgadis pri li post la morto de l' patrino, kaj poste de l' patro, kun kiu li travivis la plej grandan parton de sia vivo, perfekte anstataŭis por li la patrinn.

«La influo de Tatjana Aleksandrovna, diras L. N. en siaj rememoroj, konsistis en tio, ke jam dum la infaneco ŝi instruis al mi la spiritan ĝuadon de l' amo. Ne per vortoj ŝi ĝin instruadis al mi, sed per tuta sia estaĵo inokuladis al mi la amon. Mi vidis, sentis, kiel bone estas ami, kaj mi komprenis la feliĉon de l' amo».

Krom la gepatroj kaj poste onklinoj, la familio konsistis el 4 fratoj kaj unu fratino.


Ĉiu el la fratoj montradis interesan, ne ordinaran, originalan karakteron.

Unu el ili, la plej aĝa, Nikolaj, havis bonan kvietan karakteron, literaturajn talentojn kaj inklinton al la filozofio. La dua, Sergej, distingiĝis per vivega karaktero, nobleco de l' animo; li estis forte allogata de ĉiuspecaj pasioj. La tria, Dmitrij, estis serioza, religia homo, preta memofere servi al proksimulo. La pli juna fratino de L. N., Marja, estis rimarkinda per muzikaj kapabloj. Kaj L. N. kvazaŭ kunigis en sia riĉa naturo tiujn karaktertrajtojn, kiujn ĉiu el liaj fratoj posedis aparte: la literaturajn kapablojn kaj filozofiajn emojn de Nikolaj, la pasiigemon kaj noblecon de Sergej, la religiecon kaj kristanajn celadojn de Dmitrij kaj la muzikamon de sia fratino.

* * *

Estante infano, Lev Nikolaeviĉ montradis ŝanĝeman karakteron kaj originalajn strangaĵojn; jen li provas flugi, jen li elsaltas el la dua etaĝo, jen li penas antaŭkuri trion da ĉevaloj, jen lin ekkaptas malespero pro tio, ke li estas ne bela, jen liaj revoj forportas lin en idealan, feliĉegan mondon, kreatan de lia riĉa fantazio.

Post la morto de l' patro, la edukadon de l' infanoj Tolstoj provizore direktis onklino, fratino de l' patro, grafino Aleksandra Iljiniŝna Osten-Saken, sed post 4 jaroj ŝi mortis, kaj la zorgado estis transdonata al ilia alia onklino Pelageja Iljiniŝna Juškova. Ŝi forveturigis ilin ĉiujn al Kazano, kie ŝi loĝadis kune kun sia edzo. Kiam la aĝo ĝin permesis — ĉiuj kvar fratoj estis enregistritaj (en-



LEV TOLSTOJ.

s-kribataj) ĉe la Kazana universitato. Antaŭe ili lernadis hejme. Ili havis gubernistojn germanajn kaj francajn. Unu el ili, germano Fjodor Ivanoviĉ Ressel estas priskribita de L. N. sub la nomo de Karl Ivānoviĉ Maŭer en lia novelo «Infaneco», kaj alia, franco Prosper Sen-Tomā, estas prezentita en «La dua infaneco», sub la nomo de Sen-Jeróm. Ĉe la universitato L. N. lernis malbone. Lia vivega malhumila naturo neniel povis sin submeti al la postuloj de l' regna instruero: li tute ne povis lerni akurate io-

mete el ĉiu fako, kiel postulis la programo. Se li estis allogata de iu ajn fako, li tute donadis sin al ĝi, legante, verkante, interparolante kun la profesoro; pro tio, li malzorgadis la ceterajn fakojn, ricevadis malbonajn atestciferojn (atestaĵojn) ĉe l' ekzamenoj, kaj la postulojn de l' estraro li konsideradis, kiel ĝenon de sia libereco. Ĉio ĉi kaŭzis tion, ke li ne finis la universitatajn studojn; la unuan jaron li aŭskultadis la lecionojn ĉe la fakultato de orientaj lingvoj, poste, li lasis tiun fakultaton por la jurista, kaj fine, kiam liaj pli aĝaj fratoj, lasinte la universitaton, estis forveturintaj el Kazano, li same ĉesigis la studadon kaj venis loĝadi ĉe Ĵasnaja Polana, kun bona intenco helpi laŭpove al siaj servutuloj. Ĝi estis en la jaro 1847. Sed kiel li povis agadi ame rilate al siaj sklavoj, se li lasadis ilin ĉiam en sklaveco? L. N. baldaŭ eksentis la malnaturecon de sia situacio kaj ĉesigis tiun agadon. Pri la liberigo de l' servutuloj, tiutempe pensis ankoraŭ malmultaj. L. N. priskribis tiun provadon en la novelo « Mateno de bienhavanto ». Malkontentigite de tiu agado, li penadis serĉi ion alian, komencadis multajn entreprenojn, ne finante ilin kaj ne trovante la kontentigon.

Tiu malfeliĉa tempo-fino de l' kvardekaj jaroj, estis terura tempo por L. N. Kelkafoje li estis apenaŭ ne pereonta. Jen li sin donas al la sendetena diboĉo, jen lin ekkaptas malluma malespero; li turmentas sin mem kaj ne povas trovi sufiĉe da fortoj, por forkuri de tia senlirejo. Kiel dronanto provas sin teni ĉe pajlero, tiel li provis trovi en la ekstera mondo almenaŭ ion ajn, kio povus eltiri lin de lia entiranta (pereiganta) ĉirkaŭantaro.

* * *

Fine, favora cirkonstanco prezentigis al li. Lia plej aĝa frato Nikolaj alvenis forpermesite de Kaŭkazo, kie li servadis, kiel artileria oficiro en unu el la ĉelimaj *stanicoj* (1) de l' Tera provinco (teritorio). Post la fino de l' forpermeso, L. N. kune kun li, en la printempo de l' jaro 1851^a, forveturis Kaŭkazon.

Ambaŭ fratoj venis alla stanica Stârಾಗladovskaja — servada loko de L. N. — Komence L. N. vivis tie, kiel privatulo, kaj, kiel memvolulo li partoprenis je kelkaj surprizaj atakoj kontraŭ *ĉeĉnoj* (2). Fine, la parencoj ekadmonis lin enregistriĝi por la servado kaj li, plenuminte ekzamenojn en Tifliso, fariĝis *jun-ker* (3) ĉe la sama artileria brigado, kie servadis lia frato. La vivo en Kaŭkazo, postlasis al L. N. la plej bonajn memorojn pri la juneco, poezio, bel-ega naturo, duonsovaĝaj sed sinceraj, bonanimaj teraj kozakoj kaj ĉefe, la memoron pri tio, ke meze de tia mirinda ĉirkaŭaĵo naskiĝis liaj unuaj kreantaj fortoj.

Tie, en Kaŭkazo, li skribis sian unuan novelon « Historio de mia infaneco », modeste subskribitan sole per komencaj literoj L. N. T., kaj laŭditan laŭvalore de poeto Nekrasov, tiam redaktoro de l' revuo « Sovremennik » (Nuntempulo), kie ĝi estis presita en la septembra libro de l' jaro 1852.

En Kaŭkazo L. N. je l' unua fojo eksentis sian destinon. En sia taglibro, printempe de l' jaro 1852, li skribas la jenan notajon. « Ekzistas en mi io, kio

igas min kredi ke mi naskiĝis ne por tio, ke mi estu simila al ĉiuj ». Kelkafoje lia vivo en Kaŭkazo, pro la milita tempo, troviĝis en danĝero. Sed rekompence tiu sama kaŭkaza vivo donis al L. N. materialon por liaj artplenaj rakontoj: « Subita atako », « Hakado de arbaro », « Renkonto ĉe Taĉmento », kaj, fine, por la plej bona el liaj noveloj « Kozakoj ». La heroo de tiu novelo, Olenin, enkorpiĝas en si multajn karaktertraĵojn de l' tiam L. N. mem.

Pli ol unu fojon, L. N. deziris kunigi kun tiu primitiva vivo, kiu estis lin ĉirkaŭanta en Kaŭkazo, sed la kutimoj de l' edukado, la bezonoj de l' spirito kaj de l' koro, — ĉio, kion oni nomas kulturo, ne permesis ĝin al li, kaj la vivado meze de l' enuigaj militaj marŝadoj, tendaroj, oficiroj, karta ludado ektedis lin, kaj li denove komencis serĉi ian ŝanĝon. Fine, li sukcesis ricevi permeson servadi en la Dunaa armeo ĉe l' stabo de princo Gorĉakov. Ĝi estis en la jaro 1854. Okaze de sia foriro el Kaŭkazo, li estis promociita (farita) oficiro.

L. N. partoprenis je la furioza atako de Silistrio; tiu atako ne estis finita, ĉar la milita marŝalo ordonis ĉesigi la sieĝon kaj komenci la foriradon. Longa, enuiga formarŝado de l' Dunaa armeo post la malsukcesa militiro, certe, ne povis kontentigi la vivegan junan oficiro, soifantan heroaĵojn kaj ian ajn agadon. Tiatempe estis jam komencita la sieĝo de Sevastopolo, kaj L. N. elpetis permeson aliĝi al la sieĝatoj. Li alvenis Sevastopolon en novembro de l' jaro 1854. Tie li travivis multe da malagrablaĵoj dum la danĝeraj eliratakoj kaj ĉe la enuiga rezerva garda servado. Spite la konstanta minaco de l' morto, tiu tempo lasis en L. N. la plej helajn memorojn.

Lia interna vivo ree intensece eklaboris, kaj li notas en sia taglibro la jenan profetaĵon pri si mem: « La interparolado pri dieco kaj kredo elvokis en mi grandan, grandegan ideon, al kies realigado mi sentas min kapabla dediĉi mian vivon. Tiu ideo — fondo de nova religio, konforma al la evolucio de l' homaro, de krista religio, purigita de mistera kredo, de religio praktika ne promesanta estontan feliĉegon, sed feliĉiganta sur la tero ».

Vivplenajn pentraĵojn de la batala Sevastopola vivado, la tutan tragedian situacion de l' homoj amantaj, sin trovantaj en la stato de sovaĝaj bestoj, kruelege sin ĵetantaj unu sur alian por reciproka ekstermado, kun eksterorda veremeco kaj profundeco L. N. priskribis en siaj « Sevastopolaj Rakontoj ».

Post kapitulaco de Sevastopol, L. N. estis sendata, kiel kuriero, Peterburgon kun raporto pri la irado de l' militaj aferoj, kaj li ne plu reiris al la armeo. De l' alveno Peterburgon, aŭtune de l' jaro 1855^a, por L. N. komenciĝas nova vivo meze de rondeto de l' plej bonaj tiamaj verkistoj, pleje kunlaborantoj de l' revuo « Sovremennik ». L. N. estis akceptata en tiu rondeto, kiel ĝia ano, sed baldaŭ multaj el ili disreviĝis je li, ĉar L. N. kvankam donante siajn verkojn por tiu revuo, neniam povis ligi intimajn rilatojn kun ĝiaj kunlaborantoj; li restis ĉiam fremda al iliaj interesoj. Krom tio, li ofte ekdisputis kontraŭ la anoj de tiu rondeto, akre esprimante sian opinion, kaj baldaŭ tute apartiĝis de ili.

La sincera naturo de L. N. ne povis toleri tiun disvastigon kaj nenaturecon, kiun li rinarkadis en la plej bonaj reprezentantoj de l' tiam rusa literaturo. Malkontentigite de tiu elekta societo, li

(1) Kozaka vilaĝo.

(2) Kaŭkaza nacio.

(3) Suboficiro el nobeloj.

forveturis por sia unua eksterlanda vojaĝo, ŝajne sen ia aju serioza celo. Sed por li ĝi estis nur preteksto, por forlasi la premantan vivmanieron; liaj internaj fortoj dume daŭrigadis sian detruan kaj kreaan laboron.

En Parizo, la 6^{an} de aprilo 1857, L. N. ĉeestis je ekzekuto. Tiu terura vidaĝo faris sur lin neforges-eblan impreson. En siaj postsekvintaj verkoj li pli ol unu fojon, rememoras pri tio. Jen, kion li diras pri tio en la « Konfesado ».

Kiam mi ekvidis, kiel la kapo apartiĝis de l' korpo, kaj ambaŭ ekfrapis la fundon de l' kesto, mi komprenis — ne per la spirito, sed per la tuta estaĝo, — ke neniam teorioj, proklamantaj la raciecon de l' ekzistanta progreso, ne povas pravigi tiun agon ».

Tiamaniere en la centro mem de civilizacio kaj de ĉiuseca progreso, L. N. ekvidis ĝian putrantan ulceron: kredon de homoj je l' kruela perforto, sed ne je l' bono, kaj tial ĉiu iluzio pri la bonfareco de tiu progreso malaperis por li.

Vojaĝinte duonon da jaro, L. N. revenis Rusujon kaj traveturinte Peterburĝon, ekloĝiĝis ĉe Jasnaja Polana.

Lia apartigo de l' verkista rondeto elvokis flanke de l' literatura kritiko apartan atenton al li. Tuta aro da belaj rakontoj, presitaj de li je l' fino de l' 50-aj jaroj, estis preskaŭ nerimarkita. Tio igis unu pli konsciencan kritikiston skribi artikolon pri la verkoj de L. N., sub la titolo: « Pri la fenomenoj en la rusa literaturo, preterlasitaj de l' nuntempa kritiko. »

L. N. komencis tiun ekskomunikon de l' literatura eklezio kaj skribis en sia taglibro, en oktobro de l' jaro 1857: « Peterburĝo komence ĉagrenis min, poste montris mian pravecon. Mia reputacio eksilentis aŭ apenaŭ kraketis. Kaj mi treege ĉagreniĝis interne de l' animo, sed nun mi estas trankvila; mi scias, ke mi havas, kion diri plie, ke al mi ne mankas la forto, por diri forlike, kaj poste la publiko diru, kion ajn ĝi volos. Sed mi devas labori konsciencie, oferi ĉiujn miajn fortojn, tiam: oni kraĉu sur altaron. »

Tiamaniere li jam tiam konscie starigis sian sendependecon de l' socia opinio kaj per tio akiris por si senliman liberecon.

En Jasnaja Polana li sin okupis per mastraĵo kaj renovigis la lernejan instruadon, komencitan de li jam en la jaro 1849. La okupadoj pri la infanoj ĉiam allogis L. N., sed li volis konduki tiun aferon kun plena konscio de ĝia graveco kaj kun tuta armilaro de l' nuntempaj sciencopedagogiaj scioj. Li sin okupis per legado, komencis interrilatiĝi kun la pedagogoj kaj viziti la modelajn lernejojn. Ne trovante je tio sufiĉan kontentigon, li decidis konatiĝi kun la organizo de la lerneja instruado en Eŭropo, kaj ekintencis fari novan fremdlandan vojaĝon. Ni ne scias, ĉu li baldaŭ efektive vojaĝis sole por instruada celo, sed grava malsano de l' amata pli aĝa frato, jam sendita de l' kuracistoj eksterlanden, devigis lin rapidigi tiun vojaĝon, kaj li denove veturis alilandon en julio de l' jaro 1860, tiun ĉi fojon en kompanio de l' fratino kun ŝiaj infanoj. Ili rapidis al la malsana frato, loĝanta en Soden, ĉar ili estis ricevintaj maltrankviligajn novaĵojn pri lia farto. La malsanulo estis baldaŭ transveturigata sudon de Francujo, en la urbon Hiero, kie li post unu monato mortis inter la brakoj de L. N.

La morto de l' amata frato havis por li grandegan signifon. Ĝi starigis antaŭ li la ĉefajn demandojn de l' vivo, kaj elvokis en li nedeteneblan (nepran) bezonon solvi ilin tiel aŭ alie. Kaj tiu bezono, tiu serĉado de solvoj de tiu tempo neniam lin forlasis; prokrastite pro diversaj zorgoj pri la vivado, ĝi ĉiam kreskis en li kaj fortiĝis, ĝis kiam ĝi ricevis plenan solvon.

Tuj kiam la impresoj pri la morto de l' frato estis iom malplifortiĝinta, kiam li povis pensi pri siaj aferoj, L. N. daŭrigis sian vojaĝon, dum kiu li ĉefe celis vizitadi la lernejojn kaj interparoladi kun la plej bonaj pedagogoj de tiu tempo. L. N. vizitis multajn lernejojn de Germanujo, Francujo, Anglujo, observante la praktikon kaj konatiĝante kun la teorioj, sed neniam certigadoj de l' pedagogoj, neniam modelaj lernejoj povis lin konvinki, ke la sistemoj, akceptitaj en Eŭropo, estas la plej bonaj kaj povas esti uzataj en Rusujo. Ĉiuj liaj studadoj kaj eksperimentoj ankoraŭ pli konvinkigis lin je tio, ke por la popola instruado en Rusujo oni devas elekti tute originalan kaj memstaran metodon. Kaj en aprilo de l' jaro 1861 reveninte Rusujon, L. N. kun novaj fortoj kaj pasieco sin donis al la lerneja instruado. En la jaro 1861 li estis dum kelka tempo deturnata de sia okupado pri la lernejo per la ofico de paciga perulo. L. N., sindona al la liberigo de l' servutuloj, per tiu ofico fariĝis publika defendanto de l' popolo. Vidante, ke la bienhavantoj — servutantoj penadas per ĉiuj fortoj konservi siajn privilegiojn, L. N. uzadis la tutan forton de sia influo, kontraŭstarante ilin, defendante la liberecon kaj interesojn de l' kamparanoj. Okazis, ke pri multaj disputadoj inter la bienhavantoj kaj plugistoj li faris juĝdecidon ne por la profito de l' bienhavantoj; tial li baldaŭ altiris al si fortan malamon de tradiciemaj nobeluloj (partianoj de malnova ordo), ili komencis ĉiel malakeli lian agadon, ili skribis denunciaĵojn kontraŭ li, kaj dum la kunvenoj de l' pacigaj juĝistoj eĉ ofendis lin per videbla malŝato de lia opinio. Vidante, ke li ne havas fortojn, por sukcese batali kontraŭ siaj kontraŭuloj li forlasis tiun oficon kaj koncentrigis tutan sian agadon al la popola lernejo.

Por pli libere kaj memstare eldiri siajn opiniojn kaj efektivi ilin — krom la lernejo, kie li instruis mem kun siaj helpantoj — li komencis eldoni la revuon « Jasnaja Polana » en kiu li skribis artikolojn pri la plej gravaj demandoj de l' edukado, klerigado kaj instruado, plie li presis en ĝi raportojn pri la lerneja agado de si mem kaj de kelkaj instruistoj de l' najbaraj lernejoj, laborantaj sub lia direktado.

La esenco de la pedagogiaj opinioj de L. N. konsistas en tio, ke la klerigado devas esti libera, ke la metodo, por komuniki la sciaĵojn, devas esti bazita sur la sperto, kaj devas esti juĝata la plej bona metodo, dank' al kiu la kamparaj infanoj plej rapide kaj facile povas akiri la sciojn, kiujn ili bezonas por sia vivo. Tial li tute malkonfesadis la devigan klerigadon, tiel same, kiel la sistemojn de klerigado artefaritajn, ellaboritajn sen loka sperto, grandparte imititajn de l' Okcidento, plie ĉiusecajn programojn de l' instruado, elpensitajn de kleruloj kaj de registaraj oficistoj en kiuj estis jam antaŭdecidita tio, kion devas scii la popolo, ne demandante ĝin mem, ĉu ĝi deziras sin instrui je tio, kaj ĉu ĝi konfesas tion utila.

Kompreneble, ankaŭ tiu agado kaj tiu predikado,

montranta la hipokritecon de l' pastroj de l' scienco unuflanke kaj de l' malklerecamantoj aliflanke, elvokis kontraŭ li novan persekutadon. Instruitaj pedagogoj kaj literaturistoj, escepte malmultaj, malŝate silentadis, ne indigante per atento tiujn « nobelulajn strangaĵojn » kaj la servistoj de mallumo skribadis denunciaĵojn kontraŭ L. N., kiel malhelpanton de l' societa trankvileco kaj sendanĝereco. Tuta tiu batalado lacigis L. N. kaj difektis liajn fortojn. Li serioze ekmalŝanĝis, kaj timante la ftizon, jam forportintan liajn du fratojn, — li veturis somere de l' jaro 1862^a Samaran gubernion, por sin kuracadi per kumiso kaj ripozadi.

Dume la mallumaj fortoj daŭrigis sian laboron, kaj en lia foresto, al Jasnaja Polana surprize venis la ĝendarmoj por traserĉado; ĉion renversante kaj difektante, ili ektimigis kaj maltrankviligis per malĝentila aroganteco liajn onklinjn kaj fratinon, restadintajn ĉe Jasnaja Polana; ili nenion trovis kaj minacinte fari baldaŭ novan traserĉadon, forveturis por daŭrigi sian abomenan agadon en aliaj najbaraj lernejoj direktataj de L. N.

L. N. eksciis pri tio jam je l' revena vojo en Moskvo, li estis treege ofendita kaj indignis de tiu aroganta atako. Lia indigno klare montriĝas en liaj tiamaj leteroj al lia amikino, grafino A.A. Tolstoj,

en kiuj li petas ŝin komuniki tion al la influpovaj personoj. Sed tiuj elmontroj de indigno restis senfruktaj. La neripareblo estis farita: la okupadoj en la lernejoj malordigis, la ĉirkaŭe loĝantaj kamparanoj ne povis plu havi la antaŭan konfidon, kaj L.N. tute ne sukcesis plu restarigi la aferon sur la saman fundamenton, sur kiu li ĝin komencis.

Sed, krom tiuj eksteraj okazintaĵoj la interna vivo same ne lasis ripozadi L. N. La postuloj de li mem estis tiel grandaj, la sincereco de lia memkonscio — tiel senindulga, ke eĉ tia neprofitema kaj memoferanta agado, kiun li prenis sur sin, ne kontentigadis lin. Pleje lin turmentis la foresto de plena harmonia mondrigardo, kiu povus respondi la demandojn pri la senco de l' vivo, pri la destino de l' homo, — demandojn, kiujn li ĉiam faris tutsincere: la duonrespondoj ne povis lin kontentigi.

Ankoraŭ unu flauko de l' vivo ne lasadis lin trankvila. Lia inklino al la familia vivo, pri kiu li tiel ofte revadis, ne estis ankoraŭ kontentigita, kaj, dank' al ĉio ĉi, lin ekkaptis maltrankvileco, el kiu lia animo turmente serĉadis ian ajn eliron.

Sed tiu flanko de lia vivo, tiu parto de maltrankviloj kaj duboj trovis baldaŭ sian kontentigon. L.N. komencis viziti la familion de doktoro Bers; tie

El la vivado de Holanda hinduja Ofciro.

De multaj jaroj holanda Hindujo bolas kaj, periode, telegramoj kaj gazetoj sciigas nin pri mortigaj bataletoj. Ni enpresas hodiaŭ ellitraĵojn el la marŝjurnalo de komandanto de nova kolono, afable tradukitajn por niaj legantoj, de tiu ofciro, nia fervora samideano, Kapitano A. den Hengst.



INDIGENA VILAĜO EN LA EBENAĴO APUD LA MARBORDO,

La forto de la holanda hinduja armeo estas proksimume 40.000 homoj, nome 1500 ofciroj, 16.000 eŭropaj soldatoj kaj 23.000 indigenaj soldatoj.

La plej granda parto el la eŭropaj soldatoj (Holandoj, Germanoj, Svisoj kaj Belgoj) elvenas el Nederlando; multajn Germanojn mi parolis, kiuj pli frue estis soldatoj en la fremda legiono en Alĝerio kaj Tonkin'o.

La indigenaj soldatoj (Javanoj, Sundoj, Ambonoj, k. t. p.) varbiĝas en la diversaj insuloj de Hindujo.

Nun la plej granda parto de l' armeo estas en agado. En Atjeh (norda lando de Sumatra) ni bataladas jam de 34 jaroj, en Djambi de 6 jaroj, en Selebes de 1 jaro. Ĝus la ekspedicio en la insulo Bali estas bone finita, kaj plezure mi sendas al vi kelkajn detaĵojn pri ĝi.

Dum unu jaro parto de la holanda hinduja armeo batalis en la interna lando de la insulo Selebes. Multaj indigenaj (enlandaj) ĉefoj submetis sin, sed ankaŭ multaj preferas la morton pli ol la submetiĝon; pro tio neĉesanta ĉasado, de niaj soldatoj, de bandetoj da ribelantoj.

La suda interna lando de l' insulo estas preskaŭ trankvila, tamen de tempo al tempo kelkaj taĉmentoj devas trakuri tiun parton.

estis tri junaj filinoj en aĝo de fianĉinoj. L. N. pasie enamiĝis je la plej juna el ili, Sofio, kiu same forte lin ekamis; li faris proponon de edziĝo, ne senpene havis la konsenton de l' patro; oni atendis nur unu semajnon, por fari edziĝan solenon, kaj la feliĉaj geedzoj forveturis al Jasnaja Polana, por konstruadi sian novan neston, kie ilin renkontis la amanta onklinjo Tatjana Aleksandrovna kaj la frato de L. N. Tolstoj, kiuj ankaŭ poste ofte vizitis ilin. Tio okazis la 23^{an} de septembro 1862.

Tiu okazintaĵo ŝanĝis la tutan vivmanieron de D. N. Kontentigante unu el la plej rajtaj homaj bezonoj, — bezono de familia vivo, familia rifuĝejo, — ĝi forpuŝis por pli malfrua tempo aliajn pli profundajn demandojn de l' vivo kaj liberigis por la nova aktiveco liajn artajn, kreaĵn fortojn.

Por L. N. komenciĝis tiu periodo, pri kiu en la antaŭparolo al siaj rememoroj li diras la jenon: «la tria, 18-jara periodo, de l' edziĝo ĝis mia spirita naskiĝo, kiu je l' monda vidpunkto oni povus nomi morala, t. e. dum tiuj 18 jaroj mi vivis de regula, honesta familia vivo, ne min donante al iaj malvirtoj, kondamnataj de l' publika opinio, sed kies ĉiuj interesoj estis limigitaj per la egoistaj zorgoj pri la familio, pri la pliigo de l' haveco, pri la akiro de l' literatura sukceso kaj por ĉiuspecaj plezuroj».

Kaj jen tuj kiam L. N. komencis tiun «monduman vivadon», la mondo denove rekonis lin sia, denove afable ridetis al li kaj rekompencis lin de l' neniam vidita (eksterordinara) literatura gloro.

Dum la unuaj jaroj post sia edziĝo, L. N. komencas skribi sian plej gravan literaturan verkon, historian romanon «Milito kaj Paco». Grandegaj artaj fortoj estis uzitaj de li por detalete reprezenti la moraron de l' altklasa rusa societo kaj de l' popola vivado dum tiu tempo, kiam Rusujo faris senfinajn militojn kun Napoleono, Francujo kaj kun aliaj regnoj de Eŭropo.

La movado de l' popoloj, simile al la ondiga oceano, ĵetanta siajn grandegajn ondojn jen al unu bordo, jen al alia — tiu subita, per neniam homaj konsideroj klarigebla transmovado de l' centmilaj homaj aregoj jen de l' Okcidento al la Oriento, jen de l' Oriento al la Okcidento, servis por L. N. kiel materialo, por esprimi sian opinion pri la historio kaj signifo de l' aŭtoritateco. La rezultato, al kiu li venis, estis la jena: la grandaj historiaj okazintaĵoj estas regataj de nevideblaj kaj nekompreneblaj al ni superaj fortoj de l' Providenco, kiel diras la kredantoj de l' historiaj leĝoj, kiel ilin nomas la nekredantoj. La potenculoj aŭ la homoj sin opiniantaj gvidistoj de tiuj okazintaĵoj, en la realeco aperas,

Antaŭ nelonge mi ricevis ordonon por patroli (patrouiller) dum tri semajnoj en la iama regno de Goa. Tri taĉmentoj devis agadi en diversaj partoj.


Mallongan priskribon de la marŝo farita de mi, mi penos doni al la legantoj de «Tra la Mondo».

Mia taĉmento konsistas el du grupoj. Ĉiu grupo estas roto da 20 pafilportistoj, nome unu eŭropa serĝento, unu javana serĝento, unu javana korporalo kaj deksep javanaj soldatoj.

La soldatoj kaj suboficioj estas armitaj je la pafilo modelo '95 (sistemo Mannlicher, kalibro 6.5 m M.).

Ĉiu grupo estas provizita per tri ŝnuroj, longaj je 30 metroj, por povi transiri riverojn, kiam la fluado estas rapidega kaj tri torĉoj, servantaj por lumigi la indigenajn domojn dum nokta ĉirkaŭiro kaj traserĉado.

Ĉiu grupo enhavas tri deviglaboristojn; ili estas indigenaj kondamnitoj, kiuj akompanas la soldatojn, kaj devas porti la vunditojn, malsanulojn, k. t. p. Unu tandoe (brankardo portebla) estas portata de du deviglaboristoj, la tria estas rezervo. Kiel bolilaron (kuirilaron) mi kunprenis tri aluminiajn bolkaldronojn, kiujn oni povas meti unu en la alian; en la plej malgranda kaldrono, bonfermebla, estas du aluminiaj rostiloj, tri tranĉiloj kaj unu hakilo.



LA CENTRO DE LA BIVAKO.

Ĉio estas facile portebla de du homoj. La manĝaĵoj estis surŝarĝitaj sur ses fortaj ĉevaloj, kaj konsistis el rizo kaj konservita viando por tri tagoj, kafo, teo, saltitaj fiŝoj, sekigita legomsupo, salo, vinagro, kokosoleo, ajloj, petrolo kaj sapo por tri semajnoj.

Rizon kaj viandon por la al'aj tagoj mi devis aĉeti ĉe la loĝantaro.

Post marŝado dum tri tagoj mi estis trakurinta interspacon da 60 palisoj (90 kilometroj) en monta lando kaj estis atinginta vilaĝeton konsistantan el kvar dometoj, kuŝantan super alta monteto en valo, kiu estas 600 metroj super la marnivelo. Tio estis bona loko por restadi kelkajn tagojn.

Ĉe l' piedo fluis ŝtonplena monta rivereto, ronde ĉirkaŭita de altaj montoj; mi havis, supre, vidiĝon tre rigardindan.

La dometo, kiun mi elserĉis por bivako, estis forlasita de la loĝantoj, kaj fine, post lacegiga marŝado dum dek horoj, miaj soldatoj povis iom ripozi kaj prepari la tagmanĝon.

kiel blindaj iloj de tiuj nekompreneblaj fortoj. Ju pli la homo sin imagas potenculo, des pli malgrandega li fariĝas antaŭ la eternaj leĝoj de l' Verō; ekzemple: Napoleono. Ju pli profunde la homo komprenas tiujn eternajn leĝojn, ju pli volonte li sin submetas al ili kaj penas plenumi sole la volon de l' popolo (popola voĉo, dia voĉo), — des pli granda fariĝas tiu homo; — ekzemple: Kutuzov'.

La tipo de l' rusa popolo estas personigita per la persono de modesta, kvieta, bonanima soldato Karataev, ĉion suferanta, pri nenio plendanta kaj al ĉiuj servanta, ĉiujn konsolanta, laborema kaj ĝojema. Ĉiuj tiuj ĉi pensoj tre ne plaĉis al rondeto de tiamaj liberalaj verkistoj kaj multaj el ili penadis elmoki ilian aŭtoron. Sed la forto de l' arta kreeco, montrata de L. N. en tiu verko, estis tiel granda, ke ĉiuj elmokadoj dronis en maro de laŭdoj kaj de ravoj, stampintaj L. N. kiel geniulon.

La 70^a jaroj trovas L. N. denove okupata pri la pedagogio. Li skribas sian «*Azbukon*» (1) (alfabetlibro), denove aranĝas en sia hejmo lernejon por la kamparaj infanoj, faras la provojn de l' kompara instruado ĉe la Moskva Komitato de l' Popola Instruado, kaj fine daŭrigas la disputadon per la

(1) *Az, buki* = la 2 unuaj literoj de l' antikva rusa alfabeto.

preso, presigante en «*Patruja Kroniko*» («*Otĉestvennyja Zapiski*»), januaro de l' jaro 1874, artikolon titolitan: pri la popola instruado. Tiu artikolo elvokis ventegon da indigno kaj ravo. La famaj pedagogoj dividiĝis je du partioj: la unuj estis por Tolstoj, aliaj por Bunakov kaj Evtušerski, kies metodojn neis L. N. Interalie, defendon de pedagogiaj opinioj de L. N. skribis en «*Otĉestvennyja Zapiski*» N. Mihajlovskij, sin montrante, kiel sia publika partiano.

Samtempe kun tiaj pedagogiaj okupadoj fariĝis granda krea laboro, — kreo de nova arta verko, romano «*Anna Karenina*».

En tiu romano, por kies epigrafo li prenis la eldiron: «*Al mi apartenas la venĝo, kaj mi ĝin faros*» (Rom. XII. 19) estas esprimita tiu ideo, ke la homo, rompinte moralan leĝon, estas punata de tiu supera forto, kiu starigis tiujn leĝojn. Apud la tipojrompantoj de l' leĝo, li reprezentis la tipojn, plenumantajn la leĝon de l' vivo kaj ĝuantajn feliĉon kaj bonstaton. En la priskribo de familiaj ĝojoj kaj malĝojoj ni renkontas multajn trajtojn, rememorantajn la efektivan familian vivon de L. N. Krom tio, en tiu romano troviĝas la tipo de Levin, per multaj trajtoj esprimanta la karakteron de L. N. mem kun lia eterna serĉado de l' vero, kun lia amo al la

Baldaŭ estis farita la kuirejo, nome sub ĉiu kaldrono tri grandaj ŝtonoj, kelkaj arbobranĉoj, iom da petrolo kaj la tri fajroj hele lumigis la bivakon (je la sesa horo vespere tie ĉi fariĝas mallume).

Post unu horo la malsataj soldatoj povis manĝi: porcion da rizo kun bakita fiŝo kaj peceton da konservita viando; kiel trinkajon, kafon.

La dometo staris sur palisoj, kaj estis ĉirkaŭita per plektaĵo el bambuo (vidu fotografajon).


Estis terurege malpure, sed tial ke estis jam mallume, oni ne vidis tion.

Post la vespermanĝo estis starigitaj du gvardistoj, kaj ni ĉiuj iris dormi, dudek supren, dudek malsupren, la aliaj eksteren.

Je la kvina horo matene mi vekigis pro malvarmo; mi kuŝis apud truo en la bambua muro, kaj la malvarma matenvento tra ĝi enpenetris.

Mi leviĝis, kaj rampis malsupren; havante mian kovrilon ĉirkaŭ miaj ŝultroj mi paŝis antaŭ la bivako.

Baldaŭ la ĉielo en oriento heliĝis, mi iris ĉe l' randon de la monteto, kaj sidiĝis sur lokon de kie mi elvidis la montojn.



KAPITANO A. DEN HENGST DONANTA ORDONOJN AL PATROLESTRO.

Iom post iom la steloj paliĝis, eble hontantaj pro tio, ke tuj finis ilia rego; strangaj koloroj montriĝis trans la suproj de l' montoj, sagoj el oro kaj fajro flugis tra la nuboj.

Jen aperis strio de blueta neĝo, kiu fiksas sin al la nuboj, kaj la randoj fariĝis lumaj, brilegaj... Ho, Dio, jen la aŭroro, la aŭroro en monta lando.

Dolĉan, freŝan matenon en la montaro, mi ĝuis, mi enspiris la malvarman aeron je plena buŝo; mi sentis min alian homon.

Sed... for tiu silenta ĝuado; estas preskaŭ la sesa horo, la servado vokas.

Jam parte vestita, mi surmetis miajn ŝuojn kaj gamasojn, kaj matenmanĝis plenteleron da vapora aveno (quaker oats, angle).

Je la sesa horo la soldatoj ordigis sin laŭvice. Tri taĉmentoj da dek soldatoj estas elsendataj de mi. Mi mem kuniras kun unu el la rotoj.

Je la naŭa horo mi estis ĉirkaŭinta vilaĝeton, almenaŭ kiam ĉiu el la elsenditaj taĉmentkomandantoj estis farinta tion, kio estis ordonita al ili.

naturu, al la popolo, kun lia deziro aliĝi al ĝi, kun liaj minutoj de malespero kaj, fine, de kontentiĝo, kiun li trovas en la vortoj, diritaj de lia laboristo, ke oni devas vivi por la animo, por Dio.

En la samaj 70^{aj} jaroj, L. N. faris multfoje vojaĝojn al la ĵus aĉetita de li Samara bieno. Somere de l' jaro 1873^a, loĝante tie, L. N. turnis sian atenton al la mizera stato de l' kamparanoj en la Samara gubernio, kiu, sekve de malbona rikolto pro sekeco estis minacataj de terura malsato. Tiu mizero igis sin senti tiom pli, ke kelkaj antaŭaj malbonaj jaroj jam englutis ĉiujn faritajn provizaĵojn L. N. faris statistikan esploron de l' ĉirkaŭantaj vilaĝoj kaj kolektinte la necesajn informaĵojn, skribis ilin en publika letero al la redaktoro de « *Moskòvskija Vjedomosti* » (Moskvaj Sciigaĵoj), alvokante la rusan societion helpi la mizeriĝantan loĝantaron. La artikolo havis sukcesan efikon. Unu el la unuaj respondis la imperiestrino. Sian grandan oferonon sekvis multegaj aliaj, kaj dum mallonga tempo estis kolektita pli ol miliono da rubloj; la helpo estis donita ĝustatempe kaj la loĝantaro estis savita de plena ruiniĝo, de malsanoj kaj troaj mortoj.

Sed ankaŭ tiu trankvila, aktiva periodo havas sian finon, kaj tede iom post iom denove ekkaptas L.N.. La pensado pri la morto ne forlasas lin, kaj la

neevidebla neniigo, per kiu ĝi minacas, igas L. N. malespere penadi, por serĉi la respondon al la demando: kial mi vivas? Kian sencon havas tuta mia vivo?

La fino de l' 70^{aj} jaroj estis la plej akra momento de lia anima krizo.

Tiuj demandoj pri la senco de l' vivo de l' unua tago de lia konscia vekigo neniam forlasadis L. N. En lia tagolibro, kiun li komencis skribi 18-jara, de l' unuaj paĝoj stariĝas jam filozofiaj problemoj. En Kaŭkazo, kuŝante meze de kanaro, atendente, kiam aperos la ĉasota apro, li solvas la problemon de l' feliĉo; ĉe la kvara bastiono meze de l' diskrevantaj ĉirkaŭ li grenadoj kaj ĝemoj de l' vunditoj sub la konstanta minaco de la morto, li meditas pri la reformado de l' kristana religio. Ĉe la lito de l' mortanta frato tiuj demandoj atingis la plej grandan streĉiĝecon (intensecon), kaj li ŝanceliĝas inter du solvoj: neesteco kaj eterneco, kaj jen simile al bruletanta lignaro kiun oni surŝutas per amaso da seka branĉaro kaj kiu kvazaŭ estingiĝas, tiel sur L. N. dum lia alproksimiĝo al la solvo de tiu tutmonda gloro, riĉeco, societa agado, — amaso da brula materialo, kiun devis trabruli la flamo bruletanta sub li.

(*Dairigota*).

P. BIRJUKOV.

Ne farante bruon, silenta, atenta kaj observema mi iris kun dek soldatoj al unua dometo.

Ĉe du limflankoj sin metas la dek soldatoj, kaj la ordono resonas: he, orang, kaluwar rumah (ho, homoj, eliru la dometon). Silento kiel en tombejo regas... neniuj respondas.

Du pafoj tra la tegmento kaj... la pordo malfermiĝas.

Tri viroj, du virinoj kaj kelkaj infanoj venis malsupren kaj genufleksis antaŭ mi.

Mi petis ilin pri la helpo de persono, kiu scias paroli la lingvon makasaran. (Vidu la 3^{an} bildon). Ĉiu dometo estas zorge traserĉata ĝis la alia flanko de l' vilaĝo, kie mi vidas dekstre kaj maldekstre la du aliajn taĉmentojn, kiuj kuŝas en embusko. Tri suspektindaj viroj, bone ŝnurligitaj, estas kaptitaj.

Dum la remarŝado la suno, kiu estis veninta mezen sur la ĉielo, komencis piki, precipe kiam oni trakuris herbejon de alang-alang (longa malmola herbo) en kiu oni ofte malaperis ĝis la ŝultroj. Kun bonesteco ni atingis arbaron, kaj la soldatoj iom povis ripozi. (Vidu la 4^{an} bildon).

Bonega kreskajo ĉiuflanke, la rotangpalmoj kreskas inter la arboj kaj levas siajn delikatajn foliojn supren. Ankoraŭ plenuo da trinkaĵo el bidono (soldata akvujo) kaj ni reiris antaŭen.

Ĉirkaŭ la dua horo posttagmeze ni estis ree en la bivako, varmegiĝintaj kaj lacegaj, tute ŝvitantaj.

La soldatoj, kiuj restis hejme, estis purigintaj la bivakon; el sub la planko de la dometo oni estis rastinta la restaĵojn de la bestoj (ĉevaloj, bubalo), kiuj antaŭe estis lokitaj tien, kaj surkovritaj je tranĉitaj alang-alang.

La tagmanĝo estis pretigita.

Ne povante manĝi pro laceco, mi iris malsupren en rivereton; tie mi banis min.

Apoginte la piedojn al granda ŝtono, mi kuŝiĝis laŭlonge en la akvo, kiu muĝante fluegas ĉirkaŭ mi. Dolĉe estis tiu ĉi malvarmeta bano; mia varma korpo perdis sian lacecon kaj ricevis novajn fortojn. Grandapetite mi supreniris kaj tagmanĝis.


Vespere mi prenis la ses unuajn numerojn de « Tra la Mondo » ĵus ricevitaĵojn antaŭ mia foriro tien ĉi. Kun la holanda lernolibro de sinjoro Dreves Uitterdijk apud mi, mi eklegis kaj ĝuis tiun legadon. Ju pli mi legas nian lingvon, des pli mi ŝatas ĝin.

Je la naŭa horo mi fermis la unuan numeron kaj iris dormi pensante: « Vivu Esperanto! »

A. DEN HENGST.



INVESTO DE INDIGENA PAJLDOMO.



PROVPREZENTADO DE « LA REĜO MIDAS ».

Ce la teatro en Orange.

Kiajn neforgeseblajn horojn travivis tiuj, kiuj dum tri tagoj sidis en la vastegaj arenoj de Orango (Orange), por kiuj estis aranĝita vere eklektika programo, absolute taŭge por liberaera teatro! Efektive, sur tiuj grandegaj scenejoj, en la majesto de tiu spektaklo, dum la silenta murmuro de densa homamaso, la afektaĵoj de sentoj, la komplikaĵoj de lerta intrigo tute ne kurtuŝis la popolamason. Nur simplaj, altaj, noblaj, ĝeneralaj ideoj, vere homaj ideoj, kiuj de la komenco de l' mondo pli rapide batigis la koron de l' popoloj, povas tie sukcesi; ĉar ili ebligas, ke la komunularo sin rekonu sub la trajtoj de l' heroj. Tial, mirinde sukcesis, la antaŭan monaton, ne nur la prezentado de *Ifigenio*, dum kiu oni ĝuis la ĉarmon de l' belegaj versoj de Racino; de *Médée* de Catulle Mendès kiu admirigis la grandan amon de l' mitologiaj heroinoj, sed ankaŭ la prezentado de du novaj teatraĵoj; *La Ciklopo* de Eŭripido aranĝita de S^{ro} Léon Riffard kaj *La Reĝo Midas'o* de S^{roj} André Avèze kaj Paul Souchon.

La Ciklopo estas la malnova historio de Polyphème (Polifem) naiva oĝro (1) kaj de l' sagaca Uliso. La ŝipo de tiu ĉi lasta, post la militado de Troie, estas puŝata al la bordoj de Sicilujo, kie loĝadas Polyphème, kiu potencas la Satirusojn, flojnu de Sileno kaj Silenon mem. La Ciklopo, allogita de la spriteco de Uliso, lin demandas pri lia nomo. « Mi estas nomata Neniu. — Bone, mi vin manĝos la lasta. » Kaj li gluteme manĝas du malfeliĉajn Grekojn. Timegigita, Uliso lin ebriiĝas, kaj profitante el lia dormo, internigas lancon en lian unikan okulon. Aŭdante la terurajn kriojn de sia ĉefo, la Satirusoj alkuras, kaj demandas, kiu estas la krimulo. « Tiu estas Neniu » kriegas Polyphème. Kaj dum ridegoj audiĝas, meze de l' tumulto, Uliso kaj liaj kunvivantoj forkuras al siaj ŝipoj.

La reĝo Midas'o estas antikva komedio, kiun kune verkis la du talentaj S^{roj} Avèze kaj Souchon. Sileno, la nutristinedzo de Bachus, ebriiĝis. Midas, rekoninte lin, ordonas, ke oni redonu

al la dio lian azenon kaj lian felsakon plenan je bonega vino. Danka, tiu ĉi lasta diris: « Eldiru deziron, kaj kia ajn ĝi estos, mi ĝin plenumos. » Post pripenso, Midas'o petas pri la povo ŝanĝi en oron ĉion, kion tuŝos lia mano. Sileno ne ŝajnas kontenta, sed tamen li cedas, kaj antaŭsciigas al la reĝo, ke estos permesate, ke li sin liberigu de tiu povo — danĝera laŭ lia opinio — banante sin en la malgrandan riveron Paktolon.

Malsaĝigite de malhumileco, Midas tute vestita per oraj teksaĵoj opinias, ke li estas la egalulo de l' dioj, kaj kuraĝas insulti Apollon'on mem. Tamen, baldaŭ venkite de la malsato, (li la ne povas manĝi, ĉar ĉiuj nutrantaĵoj, kiujn li tuŝas fariĝas oro) li kuras bani sin en la riveron Paktolon, ĉe kies bordoj Apollon'o kaj Pan'o vestitaj kiel paŝtistoj, diskutas pri la poezio. Senigite je l' fatala povo, Midas'o pasas kaj estas petata pri juĝo. Nenion divenante li elparolas juĝon favoran al Pan'o. Apollon'o, mokema, promesas danki lin. Efektive la morgaŭon matene Midas'o, vekiginte en sia palaco, stupore (2), ekvidas ke li havas orelojn de azeno. Vane li deziras kaŝi sian honton: lia barbiro Licidaso al ĝi altiras la atenton de la korteganoj kaj samurbaroj. Poste, li operacias la malfeliĉegan reĝon, kiu ne postvivis tiun operacion.

La lasta vespero estis dediĉita al Victor Hugo; oni ludis la *Burgraves*. Kiel oni rajtis esperi, tiu prezentado estis mireginda: kolosa verko bezonas ja kolosan kadron, kaj Orange estas vere la speciala loko, en kiu la Burgraves devis esti prezentataj. Nek plafono, nek volbo (3); la sublimaj (4) versoj de Victor Hugo dum kvietaj nokto supreniris ĝis la steloj; kaj kun nevenkeblaj tremetoj oni aŭdis la sorĉistinon enkorpiĝitan de la senkompara S^{rino} Segond-Weber, — aktorino de la Comédie Française (Franca Komedio) — kiu per voĉo kvazaŭ bronza sonorigis la admirindan malbenon de Guanhumara.

JOHANINO FLOURENS
H. M. de E. V. K.

(1) *Hispana*: oĝro. — *Fr.* k. *ang.*: oĝre. — *It.*: orco.

(2) *Lat.* k. *ang.*: stupor. — *It.*: stupore. — *Hispana*: estupor. — *Fr.*: stupeur.

(3) *Ang.*: vault. — *It.*: volta. — *Fr.*: voûte.

(4) *Fr.*, *ang.*, *it.*, *hispana*: sublime. — *Lat.*: sublimis.



MIKSAJ OJ.

BIBLIOGRAFIO.

Ni raportas nur pri la verkoj duoble senditaj

Tro da punktoj, Via Moŝto.

La juna duko de Saxe-Cobourg antaŭ ne longe havis heredonton. Vere ĝojega, li farigis lulilon tute ornamitan per punktoj. Kosto: 6000 fr.

Tiu lukso, ne farinda en tia okazaĵo, aliris al li fortan riproĉadon de l' germana imperiestro.

« Tio estus senkulpigebla, skribis al li la imperiestro, se la infano estus princino. Sed estonta militisto elmontras siajn sentojn en punktoj! kaj kiaj punktoj! 6000 fr.: Tio estas la jara salajro de Statoficisto! »

La juna duko mallevas la kapon antaŭ tiu kolerego.

Laŭ « *Le Cri de Paris* ».

ROKSANO.

Sesdekjara sinjorino havas filinon kiu ŝajnas kvazaŭ samaĝa kiel ŝi. Oni certigas ke ili estas du fratinoj, diris la cenzuristo; sed pli prave oni povus diri ke ili estas du patrinoj. Esp. 10072.

Esperantisto ne svisa, alpojn admiranta: « Via « Alplando » estas nepriskribeble belega, ĉarma, rava ».

Samideano svisa: « Belega certe, sed mirinde malgrandega; en mian ŝuon mi enmetas mian « alplandon » (alp-lando — al-plando).

S. W. EGGLETON.

S^o Samppa Luoma, Niermijarvi, Finnlando, deziras korespondi kun hispanaj kaj portugaliaj Samideanoj.


« Fraŭlino Cornelis en Warneton Belgique, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kun geesperantistoj de ĉiuj landoj »

Moskva Librejo « Esperanto ».

(Tverskaja, 28, Moskva, Rusujo).

Havas en sia tenejo ĉiujn Esp. librojn. Akceptas abonon de ĉiuj Esp. gazetoj.

La ĉefa tenejo de la libroj: 1) A. Saŝarov. Sur vojo al kunfratiĝo de popoloj, pr. 60 sd; 2) Ŝĉavinskij. Plena Rusa-Esp. gramatiko, pr. 1,25 sm.; 3) V. N. Devjatnin. Plena verkaro, vol. 2^a, pr. 1,05 sm. kaj 3^a vol. en presado. (Trad. de Ruslano kaj Ludmilo, de Puŝkin kaj al.)

 Ni rememorigas, ke pro la profesiaj okupoj de nia ĉefredaktoro, la venonta numero, OKTOBRO-NOVEMBRO, aperos nur je la fino de Novembro.

Fervojoj de Paris-Lyon-Méditerranée.

Internacia Ekspozicio de Elektraj aplikoj en Marseille (Aprilo-Oktoebro 1908).

La Kl^o, por ebligi la veturon tre malkaran al Marseille, de la stacidomoj de sia reĵeto, liveras al la vojaĝantoj, kiuj deziras viziti la ekspozicion, la jenajn veturajn facilecojn:

I. Individuaj ir- kaj reiraj biletoj validaj 10 tag. (dimanĉoj kaj festoj neenhavataj) kun 33 % da rabato.

II. Familiaj ir- kaj reiraj biletoj (almenaŭ 3 personoj) validaj 10 tag. (d. kaj f. neenh.). La kosto de tiuj biletoj estas tiu de la ordinara biletoj jam rabatitaj je 33 % malpli: por la 3^a persono, 10 %; por la 4^a, 20 %; por la 5^a kaj ĉiu el la pliaj, 30 %.

La biletoj estas tuj liverataj, de la 10^a de Aprilo ĝis la 31^a de Okt. 1908, en la stacidomoj Paris, Nevers, Dijon, Lyon-Perrache, Clermont-F^o, St Etienne, Nimes, Valence, Chambéry, Grenoble; kaj laŭ peto farita 48 hor. antaŭe en ĉiuj aliaj stacidomoj.

III. Ordinara ir- kaj reiraj biletoj, validaj 30 tag. (d. kaj f. enhavataj) kun 25 % da rabato en 1^a kl. kaj 20 % en 2^a kaj 3^a kl.

Tuĵa livero de la biletoj de 10^a de Aprilo ĝis 31^a de Okt. 1908, en ĉiuj stacidomoj.

La valideco de ĉiuj biletoj estas plidaŭrigebla 2 fojojn po duono propagante, pro ĉiu daŭrigo, aldonan koston egalan al 10 % el la bileta prezo.

LIBRELDONEJO « ESPERANTO ».

Moskva (Rusujo), Valovaja ul., dom Serpuhovskogo mon., kv. 5. sciigas al la rusaj esperantistoj pri sia fondigo.

Ĝi jam eldonis:

N ^o 1. — L. T. Titov — Esperanto en dek lecionoj	30 kop.
N ^o 2. — L. T. Titov — Vortaro esperanta-rusa	75 kop.
Propagandaj poŝtkartoj, kun teksto	2 kop.
Propagandaj kovertoj, kun teksto	1 kop.
Poŝtmarkoj kun portreto de D ^{ro} L. Zamenhof	3 kop.
Portretoj de D ^{ro} L. Zamenhof	25 kop.

! Al Esperanto-Korespondantoj !

Bonege aranĝita FAUKNER-ADRESARO. Prezo: 20 Sd. (per poŝtmark) por unu N^o. Enskribo senpaga. Red.: R. Faulkner, Hastacov, Bohemujo (Aŭstrio).

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis. tiu ĝin uzos.

GELLE FRERES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.

FLOR ESPERANTA

LIKVORO DE L'INTERLIGO
(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo prupas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likvoro
Ĝi meritas do la konfidon kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE

CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparoj kun kinkono, la CHABLIS QUINA, deponas maljunigante,
sed-tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn

LIVERITA LAŬ LA LEGO. L. GUYOU & J. FÈVRE
TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO. TROYES



ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève 1906

Prezo: FRANCUJE. — 11f50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj impostoj.

ALILANDE. — 4f ĉiu botelo prenita en St Etienne,
impostoj kaj transporto pluaj.

Ĝenerala Tenejo por Francujo kaj Fremdujo:
J. B. Brunon-Chauvet
St Etienne (France).

Legu DUONSURDA kaj UNUA ĈAPITRO.

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,

Ĝenevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesmitoj 75 spesdekoj).

Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warmier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).

GALA PETER

LA ĈEFA
ĈOKOLADO KUN LAKTO
EN LA MONDO

D. PETER, Kreinto, VEVEY (SVISLANDO)

NOVEGAJ VERKOJ.

Ĉe la Librairie de l'Esperanto:
Ivan Turgenev kaj A. Fiŝer. — *Kanto de Triumfanta Amo* (60 cent).
Albert Esselin — *Esperanto. Grammaire et Syntaxe* (1fr. 75).
R. Deshays — *Esperanto. Popola frazlibro en 30 lecionoj* (60 cent).
Ĉe Milner & Co, 15 A, Paternoster Row, London: *Esperanto for the English* (6 d. net).

Al eksterlandanoj, spec. al geliberpensuloj, kiuj volas perfektigi en la germana lingvo, mi korektas leterojn k t. p. senpage. Pli precizaj kondiĉoj nur por 1 internacia poŝtkupono, W. Boddin, Freienwalde a O., Germanlando

LEGU

Rumena Esperantisto.
L'Etoile Espérantiste.

ARMÉE ET MARINE.

Duonmonate ilustrita revuo de l' teraj 1 maraj armeoj.
Korespondantoj en ĉiuj landoj.
JARE:
Francujo, 12 fr. — Fremdlande 18 fr. 7,20 S.
Unu Numero 40 c. 16 Sd.

Administracio:

9, Boulevard des Italiens, Paris.
Aĉetebla ĉe ĉiuj francaj stacidomoj.

ĴUS APERIS

Prozo de Danaj-Norvegaj aŭtoroj

TRADUKITA DE

KL. TH. THOMSEN

Prez. de Klubo Esperantista, Kristiana.

PREZO: 1 FRANKO.

Aĉetebla ĉe ĉiu Esperantista librovendejo

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu No afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

Espero Pacifista — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K^o, 79 Boule St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

Socia internacia Revuo. — Pritraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

La Verda Standardo. — Scienca kaj literatura. Monate 12 paĝoj. 4 fr. (1,60 Sm.) ĉe S^{ro} Marich Agoston, Budapest IX. Ŭlloi-ut 59. IV, 8.

Voĉo de kuracistoj. — Monata organo por internacia korespondado de kuracistoj en aferoj profesiaj, etikaj kaj social-medicinaj. Jare 2 fr. 50 (1 Sm.) ĉe D^{ro} Stefan Mikolajski, Lwów, strato Sniadeckich 6, Aŭstrio-Galicio.

ALĜU AL

UNIVERSALA
ESPERANTISTA
ASOCIO

JARE: 15 Sd.

Sidejo: 8, Rue Bovy-Lysberg. Geneve-Svisujo.

LEGU

Voĉo de Kuracistoj.

Tra la Filatelio.

Filipina Esperantisto.

Suno Hispana.

Finna Esperantisto.

Vidu la anoncojn.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo, nun reformema: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco. — Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Jare 4 fr. — Ĉe British Esperanto Asocio, Museum Buildings, High Holborn, W.C. London.

Brazila Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉela administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.

Ĉasopis Ĉeských Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.) 3 k. por Aŭstrio Adm. kaj Red.: Praha, Bohemujo.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p Ĥ: 24 paĝoj da teksto, 8. paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37. Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta No: 35 cent. (14 Sd.)

Filipina Esperantisto. — Organo de Filipina Esperanto Asocio. Jare 5 fr. (2 Sm.). P. O. Box 326, Manila.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.). — N^o 1a, 3 ĉome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio.

La Lumo. — 5 fr. (2 Sm.) Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, n^o 2299 V. Tirnovo, Bulgario.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 5 fr. (2 Sm.). Warszawa, Hoza, N^o 40, m. 8.

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

De Lusthof. — Ĉiunonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.). Sin turni al la presisto de Tra la Mondo, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiustema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Kompletaj kolektoj. 6,40 Sm.

Restas ankoraŭ tre malmulte da ili akireblaj nur senpere. Kolektoj nekompletaj:

1^e mankas la Aprila N^o. 3,20 Sm.

Restas ankoraŭ 2, akireblaj nur senpere.

2^e mankas la Aprila kaj Maja N^oj. 2,40 Sm.

DUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Sen specialaj kondiĉoj. 3,20 Sm.

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ.

Ĉarma rakonto de
FRANÇOIS COPPÉE,
Aŭdo de la Franca Akademio,
Tradukita en Esperanto de A. Montrosier.
75 c. — 30 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

DUONSURDA.

Originala duakta komedio de

JOHANINO FLOURENS,

30 c. — 12 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

Rekomendataj firmoj.

ESPERANTA 80, Rue Mazarine, PARIS 6^e.
RESTORACIO Bona familia kuirajo je moderaj prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton

ANONCAGENTO. C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj kaj reklamoj. Varbas anoncojn por « Tra la Mondo ».

SVEDUJO. Profitigaj mondeponoj kontraŭ unu gradaj garantiaĵoj estas perataj de HJALMAR BÄCKSTRÖM, Stockholm C. — Telegrafadreso « Esperanto ».

Fraŭlo junulo deziras korespondadi per leteroj-fotografiaĵoj kun Italaj, Konstantinopolaj kaj Afrikaj geesperantistoj. Adreso: Rusujo. Permskaja gub.; zavod Ljstva, psal. Evgeniu Bogolubovu.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 × 20 cm), nur en Esperanto.

LITERATURA ALDONO: 16 paĝoj.

JARA ABONO: 7 fr. 50 (3 sm.)

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo,
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj
kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Preso Esperantista Societo,
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Fandejo por presiloj DEBERNY kaj K^o

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skribliteroj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantaziaĵoj. Presliteroj kun supersignoj specialaj por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj ESPERANTO. La fandejo DEBERNY kaj K^o sendos, laŭ peto, presprovajojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por ESPERANTO.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.